# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero

NEVELKANTA GLORO

•

NIA IDEALO REALIGIS

•

RESUMOJ KAJ RESONOJ

•

D-RO N. BABAČEV

•

NOVA GRAVA PAŜO

•

E-KINOKLUBO „EVRIDIKA"

•

LA URBO DE VELA

•

ENLANDA MOVADO

•

ABONKAMPANJO KOMENCIĜAS



JARO 53 • N-RO 8 • AŬGUSTO • 84




# NEVELKANTA GLORO



La 40-jara jubileo de la popola Naŭaseptembra socialisma revolucio estas festo por nia laborista klaso, por la kamparanoj, por la popola intelektularo — festo de la tuta liberama bulgara popolo. Tiu ĉi glora datreveno estas festo ankaŭ por ĉiuj bulgaraj esperantistoj.

La esperantistoj estas en la unuaj vicoj de la pacbatalantoj, de la plej fervoraj konstruantoj de internacia amikeco kaj interkompreno. Por ili la amikeco kaj interpopola kunlaborado, la paco kaj sekureco sur la Tero estas plej gravaj ideoj, testamentitaj de la kreinto de la Internacia Lingvo d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof.

La esperantistoj havas apartan kaŭzon kun plej granda ĝojo festi la jubileon de la socialisma revolucio, ĉar sen ĝi la E-movado en nia lando estus pereinta. Kiel konate, jam en la komenco de la Dua Mondmilito, la faŝista registaro malpermesis la Bulgaran Esperantistan Asocion kaj ĝian oficialan organon „Bulgara Esperantisto". Ĝis kiam estus daŭrinta tiu ĉi nokto? La Naŭa de Septembro venis por rompi ĉiujn katenojn; venis dissendante sunradiojn, varmigis la korojn, revivigis la animojn, aktivigis milionajn homamasojn, kies evoluon la reakciaj burĝaj registaroj ĉiamaniere bremsis, katenis ilin, ĵetis ilin en malliberejojn kaj koncentrejojn,pendigis kaj pafmortigis ilin — samkiel ankaŭ nun tio okazas en la kapitalisma mondo. Por la venko je la Naŭa de Septembro la bulgaraj esperantistoj havas senperan kaj realan kontribuon. La bulgara esperantista movado estis parto de la ĝenerala demokratia kontraŭfaŝisma movado de nia popolo. En la kontraŭfaŝisma batalo miloj da bulgaraj esperantistoj partoprenis, kiel membroj de nelegalaj batal-kaj sabotgrupoj kiel partizanoj, kiel helpantoj de partizanoj kaj de nelegalaj funkciuloj. Centoj da ili pereis en la batalo. Iliaj nomoj eterne brilos en la panteono de la bulgara gloro, ĉar „kiu falis por la libero, mortas neniam".

En la nomo de la Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto mi plej sincere salutas vin, karaj bulgaraj esperantistoj, kaj deziras al vi novajn, ĉiam pli grandajn sukcesojn en via laboro kiel konstruantoj de la socialismo en nia Patrolondo, kiel agantoj por amikeco kaj interkompreniĝo de la popoloj, kiel batalantoj por paco kaj humanismo, por homa feliĉo! Per la lingvo Esperanto ĉiam tiel senlace plenumu vian noblan devon de patriotoj kaj internaciistoj disflamigu la veron pri nova socialisma Bulgario tra la mondo, gajnu amikojn de nia patrolando, de la paco kaj socialismo!

**(El la raporto de SAVA DĂLBOKOV — unua vicprezidanto de la Centra Konsilantaro de la Patrolanda Fronto antaŭ la Scienc-Praktika Konferenco de BEA en Velingrad)**



Partoprenantoj en la Scienc-Praktika Konferenco en Velingrad.

Fotoj: Ĥristo Metev

BULGARA ESPERANTISTO
ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 53
AŬGUSTO
8 • 1984

# NIA IDEALO REALIĜIS...

(El la raporto de ĤRISTO GOROV, prezidanto de BEA, antaŭ la Scienc-Praktika Konferenco en Velingrad)

*Dum la kuranta jaro nia popolo festas sian kvardekjaran jubileon.*

*40 jaroj pasis post la venko de la socialisma revolucio en Bulgario! Tiu ĉi venko estas la kulmino de klasbatalo, kiu daŭris dum jardekoj. Per tiu ĉi venko komenciĝis la erao de socialismo kaj komunismo en nia lando.*

*Inspiranto, organizanto kaj gvidanto de la Naŭaseptembra revolucio estis la partio de bulgaraj komunistoj. Ĝi ellaboris la strategion kaj taktikon de la batalo, unuigis sub la standardo de la Patrolanda Fronto ĉiujn kontraŭfaŝismajn tavolojn, preparis kaj gvidis la popolamasojn al armita ribelo, kiu venkis la monarko-faŝistan tiranecon.*

*Pli ol dudek jarojn bolis la batalo konraŭ la faŝismo en nia lando. Miloj pereis kun la firma kredo, ke „Septembro estiĝos majo!" Inter la venkitaj, sed ne malkuraĝigitaj herooj estis ankaŭ la kavaliroj de la verda stelo: Teofil Daŝinov el Peŝtera, Todor Kolarov el Batak, Bonĉo Ŝanov el Pazarĝik, Georgi Ĵulev el Lesiĉevo, Vasil Popov el Bracigovo.*

*La venko de la reakcia burĝaro en septembro 1923 similis la venkon de la antikva Pirro. Jam en la komenco de 1924 la revoluciaj organizaĵoj restabiliĝis. Al ilia nombro apartenis ankaŭ la fondita en 1930 Laborista Esperanto-Asocio (LEA). En la distrikto de Pazarĝik aktivaj LEA-anoj estas Sotir Vasilev el Pazarĝik, Angel Ĉaŭŝev el Batak, Nikola Miŝev el Bracigovo.*

*Mallonga estis la ekzistado de LEA, sed ĝi lasis profundan spuron en la enlanda Esperanto-movado. Post la faŝista puĉo en 1934, kiam ne plu estas eble labori malkaŝe sub la flago de LEA, ĉiuj LEA-anoj organizite transiris en la vicojn de Bulgara Esperantista Asocio.*

*La pliparto de ili estas organizitaj en la Laborista Junulara Unuiĝo (RMS), en la Komunista Partio kaj la revoluciaj profunuiĝoj. Ilia politika kredo estas la komunismo.*

*En BEA la eksaj LEA-anoj gajnis aŭtoritaton, ĉar ili estis iniciatemaj, aktivaj kaj baldaŭ okupis gvidajn postenojn en la societoj.*

*Esperantistoj estas en la unuaj vicoj de la batalo kontraŭ faŝismo kaj militarismo. Kiam en 1936 la Hispana Respubliko petis internacian helpon kaj formiĝis la internaciaj brigadoj, kelkcentoj da bulgaraj kontraŭfaŝistoj batalis kiel volontuloj ĉe Madrido, ĉe rivero Ebro kaj Gvadalkiviro. Inter la bulgaraj interbrigadanoj estis pli ol 20 el tiu ĉi distrikto, inter ili Georgi Ĵulev el Lesiĉevo, Teofil Daŝinov el Peŝtera, Metaksa Guginski k.a. Tiuj, kiuj ne povis forveturi al Hispanio, helpis per monrimedoj, aŭ alimaniere. Esperantistoj estis elinter la plej fervoraj helpantoj de la Hispana Respubliko. Ni menciu la nomon de Trifon Ĥristovski, kiu kvankam invalido, disvastigis la gazeton „Popola Fronto" en la tuta lando.*

*Malgraŭ la obstakloj kaj minacoj fare de la polico, la bulgaraj esperantistoj ricevadis el Sovetunio librojn kaj gazetojn en Esperanto, tradukis ilin en bulgaran lingvon kaj disvastigis la veron pri la vivo en la lando. En multaj loĝlokoj esperantistoj iniciatis fondon de societoj por amikeco kun la popoloj de Sovet-Unio. Ankaŭ en Pazarĝik oni fondis tian societon kaj ĝia unua prezidanto estis la veterano de nia E-movado Ivan Vasilev.*

*La sklavigo de la balkanlandaj popoloj fare de la hitleranoj kaj la insida agreso kontraŭ Sovet-Unio forte indignigis nian popolon.*

*Por malebligi rezistadon, la faŝista ŝtataparato komencis reprezaliojn. En diversaj lokoj de*

*la lando oni instalis koncentrejojn, fabrikadis „konspirojn". Malgraŭ tio ekestis sabotado en la fabrikoj, fervojo, havenoj. Inter la unuaj organizintoj de batalgrupoj estas la sofiaj esperantistoj Nikola Botuŝev, Ĥristo Nikov kaj Nikola Ŝopov — iama sekretario de la Centra Komitato de LEA. Kiel organizantoj de batalgrupoj pereis la esperantistoj Georgi Grigorov el Varna kaj Sotir Sotirov el Pazarĝik.*

*Nur unu tagon post la insida agreso kontraŭ la lando de Sovetoj, la Centra Komitato de la Partio sin turnis al nia popolo kun alvoko leviĝi kontraŭ la malamiko. Kaj jam en la somero de 1941 ekĝermis partizanaj grupoj en la arbaroj de Rila-, Pirin- kaj Rodopi-montaroj. Inter la unuaj partizanoj estis la esperantistoj Petâr Velev el Peŝtera, Ĵeljo Demirevski el urbo Dupnica (nun Stanke Dimitrov), Dinjo Stankovski el Plovdiv, la poetoj Ĥristo Kozlev kaj Cvetan Spasov. En septembro 1941 en Batak estis fondita la unua partizana grupo, kiu transformiĝis en la legendan partizanan taĉmenton „Anton Ivanov". Inter la fondintoj estis du esperantistoj — Angel Ĉauŝev kaj Todor Kolarov. Al ili aliĝis Petâr Velev.*

*La partizana movado en Bulgario plivastiĝis kaj plifortiĝis sub la influo de la historiaj venkoj de la Ruĝa Armeo.*

*En la tornistroj de multaj partizanoj kuŝis lernolibro de Esperanto. Dum ripozhoroj ili lernis la lingvon, revante pri venonta paco, kiam ili povos kontakti kun alilandaj esperantistoj.*

*La faŝista reĝimo kreis specialajn rotojn kaj teroristajn bandojn por kontraŭbatali la partizanojn. Miloj da ili estis mortigitaj de sangavidaj faŝistaj bandoj, en tiu nombro dekoj da esperantistoj. La fama partizana taĉmento „Anton Ivanov", kiu agadis en la distrikto de Pazarĝik, perdis 120 siajn batalantojn, inter ili la vicestro Ivan Filev — Spartak kaj la komisaro Dimitâr Petrov—Fanteto estis aktivaj esperantistoj el Plovdiv. Esperantistoj estis ankaŭ Lev Ĵeljazkov, Todor Kolarov, Angel Ĉauŝev, Cvjatko Georgiev kaj aliaj.*

*Sed la faŝista teroro ne povis likvidi la partizanan movadon. En Pazarĝik-distrikto batalis la taĉmentoj „Panajot Volov", „Angel Kânĉev", brigadoj „Georgi Benkovki" kaj „Ĉepinec". Partizanoj atakis policejojn, bruligis objektojn, kiuj laboris por la germanaj trupoj. Ankaŭ en la supre menciitaj taĉmentoj kaj brigadoj estis multaj esperantistoj. En la ĉirkaŭaĵo de Velingrad en sanga batalo pereis Stoju Kalpazanov, Vela Peeva, Angel Ĉopev. La dankema popolo donis la nomon de Vela al tiu ĉi urbo, en kiu nun ni kunsidas.*

*Ankaŭ en la bulgara armeo oni preparis ribeltrupojn. Sub la komando de Diĉo Petrov grupo da soldatoj-esperantistoj transiris al la partizana movado sur jugoslava tero kaj fondis la soldatan batalionon „Ĥristo Botev", kiu batalis kontraŭ faŝistaj trupoj, germanaj, bulgaraj kaj serbaj bandoj.*

*Transiron al la jugoslavaj partizanoj iniciatis ankaŭ la esperantistoj Kiril Ignatov kaj Kiril Maĝarov, kiuj fondis la soldatan taĉmenton „Georgi Dimitrov".*

*Furiozis la faŝista teroro. Iu rotestro, kiu teroris la vilaĝanojn de Batak, deklaris: „Iam vin buĉis la turkoj, sed nun ni vin buĉos, por ekstermi la partizanojn". Batak perdis pli ol tridek partizanojn kaj helpantojn.*

*Malgraŭ la monstra teroro, pli kaj pli da patriotoj ekstaris sub la flago de la Patrolanda Fronto, en kies fondo partoprenis ankaŭ esperantistoj.*

*La bravaj filoj de nia popolo kuraĝe batalis kaj direktis la rigardojn al la nordo, kie la Ruĝa Armeo frakasis la armeojn de Hitler.*

*Venis la neforgeseblaj tagoj de septembro 1944. La laboristoj en Sofio, Plovdiv, Pazarĝik proklamis strikon. La ribelinta popolo direktis sin al la malliberejoj kaj liberigis la kaptitajn batalantojn.*

*El la montoj-protektantoj Rodopi, Sredna Gora, Balkano, Rila kaj Pirin en la urbojn kaj vilaĝojn revenis la partizanoj kaj forpelis la policanojn. La bulgara armeo transiris al la revolucio. Realiĝis la profetaĵo de la poeto, ke „Septembro estiĝos majo".*

*Post detronigo de la monarko-faŝista reĝimo venis nova tasko — forpeli la hitleranojn el nia lando kaj el la aliaj balkanaj landoj. Miloj da volontuloj aliĝis al la armeo kaj persekutis la germanajn trupojn ĝis la landlimo de Aŭstrio. En la Patrolanda Milito pereis miloj da bulgaraj soldatoj, inter ili la esperantistoj Ĵeljo Demirevski, Stefan Ĥalaĉev, Ilija Miĥajlov, Aleksandâr Pironkov-Ĉapaj kaj multaj aliaj.*

*Post la definitiva venko super la hitlerismo, en kunlaboro kun Sovet-Unio, sekvante ĝian ekzemplon, nia popolo komencis konstrui la novan vivon — ekonomion, kulturon, sciencon. Dank' al la streĉo de la fortoj nia popolo faris gigantan paŝon antaŭen kaj transformis sian landon en evoluintan industri-agraran ŝtaton.*

*Klasan saĝecon, antaŭvidemon kaj perspektivecon entenas la Programo, akceptita de la Nacia Partia Konferenco pri la Kvalito. Grandajn taskojn metis ĝi antaŭ nia popolo. Ankaŭ ni bulgaraj esperantistoj partoprenas en la realigo de tiuj taskoj, ĉar ni estas parto de nia brava popolo.*

*Ni devas levi la nivelon de nia organiza laboro, kiel en la centro, tiel ankaŭ en la distriktoj.*

*Ni devas disvastigi ankoraŭ pli sukcese Esperanton inter nia popolo, precipe inter la junularo.*

*Ni devas labori modele, havi niajn heroojn de laboro. Nia devizo estu: „Laborproduktado, disciplino kaj alta kvalito!"*

*Eternan gloron al la generacio, kiu preparis kaj faris la revolucion je la Naŭa de Septembro 1944!*

*Sub la gvido de la Partio — antaŭen al novaj sukcesoj!*

# En la nesto de rodopaj falkoj

Depost jarcentoj la regiono de Rodopi-montaro estas ligita kun gravaj eventoj el la historio de la bulgara popolo — precipe kun ĝiaj bataloj kontraŭ bizancaj kaj osmanaj invadantoj, kaj en pli nova tempo — kontraŭ la jugo de la faŝista-kapitalista regpotenco — por sociala justeco, por libero.

La restaĵoj de la iama citadelo „Cepina" — sidejo de la mezepoka bulgara reganto de tiu regiono despoto Slav; la monumentoj, preĝejoj, memortabuloj kaj kriptoj-ostejoj en la fama historia loĝloko Batak kaj en Velingrad, estas atestantoj de kruelaj bataloj kontraŭ sangavidaj osmanaj hordoj kaj faŝistaj ĝendarmoj, de la heroa pereo de karaj popolaj gefiloj. Konataj kaj nekonataj, junaj kaj maljunaj popolaj batalantoj fordonis sian vivon por la bono de la venontaj generacioj, por nova kaj justa sociordo.

En la kontraŭfaŝisma batalo, en la vicoj de partizantaĉmentoj „Anton Ivanov" kaj „Georgi Dimitrov", kies batalregionoj estis en la meza parto de Rodopi-montaro, pereis ankaŭ multaj partizanoj-esperantistoj. La nomoj de Vela Peeva, Stoju Kalpazanov, Dimitâr Petrov, Ivan Filev, Angel Ĉauŝev, Stojan Manĉev kaj aliaj estas jam legendaj. Pri ilia heroaĵo la popolo kreis poemojn kaj kantojn. Ilia vivo estas hela kaj imitinda ekzemplo por la junaj generacioj.

Memore al la pereintaj herooj-esperantistoj kaj lige kun la granda tutpopola festo — la 40-a datreveno de la socialisma revolucio en Bulgario, kiu venkis la 9-an de Septembro 1944, la Centra Estraro de BEA kune kun la loka E-societo „Stoju Kalpazanov" organizis la 16-an — 17-an de junio ĉi-jare en urbo Velingrad Scienc-Praktikan Konferencon „40 jaroj de la socialisma revolucio en Bulgario".

Al la preparlaboro de la Organiza Komitato, gvidata de Dimitâr Papazov, sekretario de CE de BEA, (en kiu aktivadis ankaŭ Manol Ĉolev, prezidanto de la E-societo en Velingrad, kaj aliaj aktivuloj de la societo kaj de CE de BEA) multe helpis ĉiuj gvidinstancoj en Velingrad kaj en la distrikto de Pazarĝik.

Tiun ĉi grandan nacian E-aranĝon partoprenis aktivuloj de la distriktaj kaj societaj estraroj de BEA, E-veteranoj, honoraj gastoj, reprezentantoj de E-asocioj el diversaj landoj aŭtoroj de sciencaj raportoj kaj referaĵoj.

La perlo de la ĉarma Ĉepino-valo — urbo Velingrad, gastame bonvenigis la partoprenantojn en la konferenco. Amika esperantista etoso regis en la akceptejo de la Junulara Domo, kie la alvenintoj el diversaj partoj de la lando renkontiĝis kun malnovaj amikoj kaj konatoj.

Sabate, la 16-an de junio, je la 9 horo, la bela konstruaĵo de la Komunuma Komitato de Bulgara Komunista Partio en Velingrad ak-




**La oficiala prezidantaro de la Scienc-Praktika Konferenco**

ceptis en sia salono la delegitojn de la konferenco.

Eksonis solena signalo„Gloron al nia Partio“, plenumita de junpionira blovinstrumenta orkestro el Velingrad sub la gvidado de Ivan Sergiev.

La E-veterano Nikola Aleksiev, heroo de socialisma laboro, merita aganto de la kulturo, per emocia enkonduka parolado malfermis la Scienc-Praktikan Konferencon. Li substrekis la meritojn de la esperantistoj el tiu ĉi regiono. kiuj partoprenis la armitan batalon kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo en nia lando. N. Aleksiev prezentis al la ĉeestantoj la membrojn de la oficiala prezidantaro: Sava Dâlbokov — unua vicprezidanto de la Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto, Dimitâr Ŝulev — unua sekretario de la Distrikta Komitato de BKP — Pazarĝik, Momĉil Popov — gvidanto de la Organiza Fako de la Komunuma Komitato de BKP — Velingrad, Nina Cinceva—prezidantino de la Komunuma Popola Konsilantaro — Velingrad, Ivan Ĥarizanov — prezidanto de la Komunuma Komitato de Aktivaj Batalantoj kontraŭ Faŝismo kaj Kapitalismo — Velingrad, Ĥristo Gorov — heroo de socialisma laboro, prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, Petâr Todorov—vicprezidanto de CE de BEA, Dimitâr Papazov — sekretario de CE de BEA, Petko Arnaudov — prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA — Pazarĝik, Stojan Tanev — honora prezidanto de DE de BEA — Pazarĝik, Manol Ĉolev — prezidanto de E-societo „Stoju Kalpazanov“ — Velingrad, d-ro Tadeusz Ejsmont — Pollando, Oszkar Princz — organiza sekretario de la Hingara E-Asocio, Franz Schick — ĉefredaktoro de revuo „Internaciisto“, Aŭstrio, Karoline Ködmön — Hungario, Elena Ostoia kaj Anna Curiman — Rumanio, Viktor Jaroŝeviĉ — USSR.

Salutparolis Sava Dâlbokov, Momĉil Popov Viktor Jaroŝeviĉ, Franz Schick kaj Tadeuzs Ejsmont. Ili ĉiuj substrakis la aktivan kaj sinoferan partoprenon de la bulgaraj esperantistoj en la batalo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo en Bulgario, ilian kontribuon al la konstruado de la nova socialisma sociordo.

Bazan raporton sub titolo „La idealo de la bulgaraj esperantistoj realiĝis“ faris Ĥristo Gorov, prezidanto de BEA. Li traktis la plej gravajn momentojn en la evoluo de la revolucia esperantista movado en nia lando kaj starigis la nun plej gravajn taskojn antaŭ la bulgaraj esperantistoj: plibonigo de la organiza laboro kaj lingva instruado, kresko de la nombro de societanoj, pliviglig o de ilia aktivado, senĉesa kaj arda laboro por konservo de la monda paco, aktiva partopreno en la socialisma konstruado.

La raporto estis aŭskultita kun granda atento kaj multfoje aplaŭdita.

Pro foresto de docento Josif Portnoj el Sovetunio, kiu ne povis ĉeesti pro subita malsaniĝo, lian raporton[1] sub titolo „La socialisma revolucio en Bulgaria kaj la sovetaj laboruloj en Kazaĥio“ tralegis Stefka Ĉenkova, kunlaborantino de CE de BEA.

Docento Portnoj jam duan fojon partoprenas niajn asociajn aranĝojn per altnivelaj raportoj kaj kontribuas al la pli bona konatiĝo kun malmulte konataj historiaj faktoj pri la rilatoj inter bulgaraj kaj kazaĥaj laboruloj post la Unua kaj Dua Mondmilitoj.

Alia bona konato kaj amiko de la bulgaraj esperantistoj estas d-ro Tadeusz Ejsmont el Pollando, kiu traktis en sia raporto antaŭ la konferenco la temon pri pola-bulgara E-kunlaborado en la periodo post la Dua Mondmilito.

Ankaŭ Dimitâr Papazov kaj Canko Murgin montris altan eruditecon kaj informitecon per siaj raportoj. Papazov esploris la evoluon kaj reviviĝon de la laborista E-movado post la 19-amaja faŝista puĉo en 1934. Murgin montris la socian optimismon de la bulgara E-movado dum la periodo 1936—1944. Krom la tre interesaj informoj kaj donitaĵoj, li prezentis ankaŭ bildojn kaj diagramojn, kio faris lian raporton ankoraŭ pli atentokapta.

Same tre interesaj kaj informoriĉaj estis la prelegoj post la tagmeza paŭzo.

Esplorante diversajn flankojn de la bulgara esperantista movado dum la periodo antaŭ la 9-a de septembro 1944, Ivan Keremidĉiev—Esperov, ĉefredaktoro de revuo „Internacia Ĵurnalisto“ detale pristudis la helajn kaj tragikajn momentojn el la agado de la progresemaj esperantistoj por konservo de la unueco de nia E-movado dum la jaroj 1940—1944; Nikola Aleksiev elokvente kaj bildece, eĉ kun sento pri humuro, rakontis pri lernado de Esperanto en la malliberejoj de faŝista Bulgario antaŭ 1944; Manol Ĉolev donis tre interesajn faktojn pri la progresema E-movado en la regiono de Velingrad. Interesajn rememorojn rakontis ankaŭ Ivanka Radkova el Goce Delĉev.

En sia ferma parolado la prezidanto de BEA Ĥristo Gorov donis altan pritakson al la Scienc-Praktika Konferenco en Velingrad kaj turnis sin kun vortoj de laŭdo kaj danko al la organizantoj kaj partoprenantoj el la lando kaj el eksterlando. „Ilia ĉeesto faris nian konferencon pli reprezenta, ĉar ili venis kune kun ni festi la jubileon de nia revolucio“ — konkludis Ĥr. Gorov.

Emociplenaj estis la momentoj de kliniĝo de la partoprenantoj en la konferenco antaŭ la monumento de la partizanino-heroino Vela Peeva, la vizito al ŝia domo-muzeo, kie sperta ĉiĉerono rakontis en Esperanto al la vizitantoj pri la vivo kaj la batalo de Vela, donis klarigojn pri la multnombraj eksponaĵoj. Florkronoj estis prezentitaj ankaŭ ĉe la monumentoj

[1] **Resumojn de la raportoj ni publikigas aparte — N. de la Red.**

de la pereintaj partizanoj-esperantistoj el Velingrad Stoju Kalpazanov kaj Angel Ĉopev.

Bonege organizita ekskurso per luksaj aŭtobusoj al la historia urbo Batak vekis multajn novajn emociojn ĉe la partoprenantoj. Eksenti senpere la gloran ribelpasintecon de tiu urbo, famigita de poetoj, verkistoj kaj ĵurnalistoj, kliniĝi antaŭ la ostoj de la pereintaj batalantoj por libero kaj justeco, kontraŭ la jugo de osmanaj turkoj kaj de bulgaraj faŝistoj; tuŝi propramane la sangajn makulojn sur la muroj de la preĝejo, kie furioziĝintaj baŝibozukaj hordoj kruele mortigis centojn da sendefendaj bulgaroj. Kortuŝaj momentoj!. . . Sed renkontiĝi kun la nova socialisma vivo de tiuj urboj, de ĝiaj loĝantoj estis alia ne malpli forta emocio!

Apartan atenton ni dediĉas al la pacmitingo, kiu okazis en la konferenca halo en Velingrad lige kun la Internacia Tago de Malarmado. Nikola Aleksiev, honora prezidanto de Mondpaca E-Movado (MEM), malfermis la mitingon kaj per konciza emociplena parolado priskribis la danĝeran por la monda paco situacion, provokitan de la imperiismaj militemuloj kaj plejparte de la administracio de la usona prezidanto Reagan. „Neniam ĝis nun la homa ekzistado estis tiom reale minacata,—li diris. — Neniam la homa civilizo troviĝis en simila kritika pozicio kaj la demando „Esti aŭ ne?“ ekstaris kun tia forto antaŭ ĉiu civitano de nia planedo. Ni devas unuiĝi — sendepende de politika, socia kaj religia aparteneco — por haltigi la manojn de frenezuloj, kiuj per nura premo de butono povus pereigi la homaron!“

En la mitingo parolis ankaŭ Oszkar Princz (Hungario) kaj Franz Schick (Aŭstrio). Ĉi-lasta proponis deklaracion pri kunlaborado kaj kunagado inter la esperantistoj el la aŭstra urbo Leoben kaj Velingrad, kiu estis entuziasme kaj unuanime akceptita. La partoprenantoj en la mitingo akceptis ankaŭ tekston de telegramo al la Tutmonda Packonsilio en la nomo de la konferencanoj — esperantistoj.

La Scienc-Praktika Konferenco de BEA, okazinta en la „nesto de rodopaj falkoj“ — urbo Velingrad, pasis sukcese. Ĝi estas unu el la plej gravaj aranĝoj de nia asocio dum la kuranta jaro, dediĉita al la glora 40-a datreveno de la socialisma revolucio en Bulgario.

Dum la tagoj de la konferenco — per raportoj kaj aktiva partopreno la bulgaraj esperantistoj — ardaj pacdefendantoj kaj entuziasmaj konstruantoj de la socialisma patrolando, esprimis sian estimon al la memoro de la pereintaj esperantistoj-batalantoj por la socialisma estonto de nova Bulgario.

Eternan gloron al la herooj-esperantistoj!

Velingrad — Sofio DONĈO ĤITROV

# RESUMOJ DE LA RAPORTOJ

## NIKOLA ALEKSIEV: ESPERANTO EN LA MALLIBEREJOJ DE FAŜISMA BULGARIO

**Valorajn informojn pri la lernado de Esperanto fare de malliberuloj publikigis la eminenta bulgara filzofo-marksisto Todor Pavlov. Lia artikolo havis grandan propagandan signifon kaj ĝi kelkfoje estis represita en la laboristaj esperantistaj eldonaĵoj.**

**Todor Pavlov konfesas, ke li komence rilatis negative al Esperanto. Li opiniis, ke Esperanto estas morta lingvo. Sed poste, sub influo de iu esperantista instruisto, li decidis mem lerni la Internacian Lingvon kaj tute ŝanĝis sian opinion. Post tralego de Esperanta traduko de la fama novelo „La familio Gerak“ de la bulgara verkisto Elin Pelin li estis mirigita — tiel bone estis prezentita en Esperanto tiu ĉi verko.**

**En la Sofia Malliberejo li vidis junajn antifaŝistojn, kiuj fervore lernis Esperanton. La samon li konstatis en la malliberejoj de Plovdiv kaj Sliven.**

**Mi mem estis en kelkaj malliberejoj (Sofio, Burgas, Ĥaskovo, Plovdiv, Sliven kaj Pleven). Tie troviĝis sufiĉe da esperantistoj kaj oni lernis la lingvon en grupoj aŭ individue.**

**En la speciala malliberejo por antifaŝistaj soldatoj en Sliven k-do Cano Ignev eldonadis esperantistan revueton. Same okazis en la malliberejo en Sliven, kie k-do Ĥristo Gorov redaktis esperantlingvan revueton en formo de kajero. En la Sofia Centra Malliberejo k-do Asen Grigorov redaktis la revueton „Kajero“. Bedaŭrinde, eĉ unu numero de tiuj eldonaĵoj ne konserviĝis. En la malliberejo tuj post la pendumo de nia karmemora Nikola Ŝopov, eksa sekretario de BuLEA, k-do Grigorov verkis originalan Esperantan poemon „Tom“ („Tom“ estis la kromnomo de Nikola Ŝopov).**

**En la malliberejo de Sliven mi renkontiĝis kun mia samgimnaziano Velko Rusinov. Li esperantistiĝis en la malliberejo, kie li pasigis 15 jarojn (de 1925 ĝis 1940). Li priskribis sian disputon kun kamarado, kiu estis kontraŭulo de Esperanto. Fine de la disputo Rusinov riproĉis lin: „Kial vi kririkas ion, kion vi ne konas?“ Tiu kamarado eklernis la lingvon kaj poste mem fariĝis esperantisto.**

**Rusinov estis en multaj malliberejoj: Vraca,**

Lom, Ŝumen, Varna, Sliven. Ĉie li trovis esperantistojn kaj helpis al multaj junuloj lerni Esperanton. Speciale pri la malliberejo de Varna li donas informojn pri organizita sekreta internacia korespondado kun esperantistoj el Greklando, Britio, Nederlando k.a. Estas videble, ke oni ne nur lernis Esperanton kaj legis Esperantan literaturon, sed sukcese gvidis ankaŭ internacian korespondadon.

Kiel videblas el tia konciza resumo de mia samtitola raporto, la reakciaj politikaj reĝimoj en Bulgario ne sukcesis sufoki la revolucian E-movadon en nia lando. Eĉ en la malliberejoj la esperantistoj ne ĉesis aktivadi kaj helpis por esperantistiĝo de centoj kaj centoj da novaj adeptoj de Esperanto. Samtempe oni edukis ilin praktile utiligi la lingvon por organizado de internacia korespondado.

Esperanto multe helpis al la internaciisma edukado de la malliberuloj. Ĉar ne sufiĉas nur teoria kono de la internaciismo: estas necesa konvena etoso, kiu kreiĝas ĉe la esperantistoj, kiam ili praktikas la Internacian Lingvon por progresemaj celoj.

Krome, la lernado de Esperanto helpis al multaj malliberuloj, precipe kun nesufiĉa lerneja instruiteco, pli profunde penetri la gepatran bulgaran lingvon. Tio levis ilian lingvan nivelon, kio same estis utila por ilia estonta socia agado inter la laboruloj kaj la progresemaj intelektuloj.

Multaj esperantistoj jam ekhavis kuraĝon okupiĝi en la malliberejoj pri lernado de aliaj fremdaj lingvoj. Esperanto faciligis ilian lernadon.

Jen kion instruas al ni la sperto de la esperantistoj — iamaj kaptitoj de la faŝisma diktaturo en Bulgario.

Doc. JOSIF PORTNOJ:

## LA SOCIALISMA REVOLUCIO EN BULGARIO KAJ LA SOVETAJ LABORULOJ EN KAZAĤIO

La venko de la popoldemokratia revolucio de la 9-a de septembro 1944, kiu laŭ sia klasa karaktero, enhavo kaj graveco estas socialisma revolucio, estas akiraĵo de la bulgara popolo sub la gvidado de Bulgara Komunista Partio kun la decida helpo de Soveta Armeo. Ĝi markas la plej grandan bazan returniĝon en la 13-jarcenta historio de Bulgario. Estante ĉefe ripetado de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, la revolucio en Bulgario metis finon al la eraoj de la ekspluatantaj klasoj en la lando, malkovris novan eraon — la eraon de la socialismo. Komenciĝis la vera historio de la bulgara popolo, nova etapo de ĝiaj interrilatoj kun la sovetaj popoloj.

En la konsisto de la sovetaj armeoj, kiuj liberigis la bulgaran popolon de la hitleraj okupantoj kaj de la cara faŝisma reĝimo, estis la formitaj en Kazaĥio 73-a gvardia kaj 387-a fusilista divizioj. La Politika Sekcio de la 73-a divizio, skribis en tiuj tagoj, ke la loĝantaro de Bulgario renkontis la Sovetan Armeon „kun eksterordinara sinceremo, afableco kaj gastameco".

Post la venko de la revolucio je la 9-a de septembro komenciĝis intima kunlaborado inter la soveta kaj bulgara popoloj en ĉiuj sferoj de la ŝtata, ekonomia kaj kultura vivo, kaj kune kun tio kreskis kaj plifortiĝis la kunlaborado de kazaĥaj kaj bulgaraj laboruloj.

Lige kun la amasa alproprigo de nekultivataj teroj en Kazaĥio kaj en aliaj orientaj regionoj de Sovet-Unio, unu el la komplikaj problemoj estis la okazigo de la kolektado de la rikolto. En 1956 la bulgara popolo aprobis la decidon de la Centra Komitato de Dimitrova Unuiĝo de la Popola Junularo sendi en Kazaĥan SSR brigadon el bulgaraj junuloj „Ĥristo Botev" por kolekti la novalan rikolton. Ĝi konsistis el 62 gejunuloj.

Responde al la deziroj de dekmiloj komunistoj kaj komsomolanoj la registaroj de Sovet-Unio kaj Bulgario en februaro 1957 subskribis kontrakton pri sendo de 10 miloj da bulgaraj laboruloj por labori en sovĥozoj, en minejoj kaj konstruataĵoj en Sovet-Unio, el tiu nombro por la konstruado de la Kazaĥa Magnitka (urbo Temirtau) — 1100 personoj, kaj en la kotonproduktaj sovĥozoj de Suda Kazaĥio — 1000 personoj. Laborante kun rusaj, kazaĥaj kaj reprezentantaj aliajn naciojn de USSR laboruloj, la bulgaroj trapasis gravan lernejon de internacia edukado.

Granda merito en la starigo kaj evoluo de la frataj interrilatoj inter la sciencistoj de Kazaĥio kaj Bulgario apartenas al la sciencisto kaj membro de la Akademio de Sciencoj de Kazaĥa SSR, Sergej Boev, doktoro de la veterinaraj sciencoj. Jam en la tridekaj jaroj li sukcesis kontaktiĝi kun la bulgaraj esperantistoj-veterinaroj, pleje kun la redaktoro de la eldonata en Esperanto „Internacia Veterinara Revuo" Georgi Popivanov. En tiu ĉi gazeto S. N. Boev publikigis siajn sciencajn artikolojn kaj referaĵojn de B. P. Vsevolodov — unua scienca publikigaĵo de kazaĥa sciencisto eksterlande.

Nuntempe la sciencistoj de Kazaĥio kaj Bulgario sukcese okazigas komunajn laborojn en la sfero de mekanizo de la erc- kaj karboproduktado, en la konservado de nutraĵoj, en la produktado de led-felaj ellaboraĵoj k.t.p. Regule en Sofio kaj Alma-Ata okazas simpozioj kaj sciencaj konferencoj de bulgaraj kaj kazaĥaj sciencistoj.

Post la Naŭaseptembra Revolucio en Bulgario efektiviĝis reciproka penetro kaj riĉiĝo de la naciaj kulturoj de Bulgario kaj Kazaĥio. Tio trovas sian enkorpiĝon en tradukado de beletraturaĵoj, en evoluantaj ligoj inter kulturaj agantoj kaj ĵurnalistoj. Pliiĝas la interŝanĝo de delegitaroj kaj kreaj kolektivoj. Kreskas la nombro de reciprokaj vizitoj de bulgaraj kaj sovetaj turistoj.

La firma bulgara-soveta amikeco estas altira ekzemplo por la vastaj popolamasoj de la kapitalismaj kaj evoluantaj landoj, kiuj batalas kontraŭ la subpremado kaj ekspluatado, por paco kaj sociala progreso.

D-RO TADEUSZ EJSMONT:

## DIREKTOJ DE LA POLA — BULGARA E-KUNLABORO POST LA DUA MONDMILITO

La jaro 1944 signis la fiaskon de faŝismo. La sekvan jaron paralele kun la kreo de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj restariĝis la E-movado en diversaj liberigitaj landoj. Ankaŭ paralele en ĉi tiuj strukturoj disvolviĝadis konceptoj de humanisma kultura interŝanĝo kaj ideoj pri pac-edukado.

En la frua postmilita periodo ankaŭ pola kaj bulgara E-movadoj akcentis, ke en la procezo de monda pacintegriĝo gravan rolon plenumas la kultura interŝanĝo kaj kunlaboro inter unuopaj nacioj. Kaj enkadre de la internacia interŝanĝo de homoj, ideoj kaj kulturaj valoroj, gravaj estas ankaŭ la lingvaj rilatoj.

Trarigardo de la informa kaj literatura enhavo de la E-periodaĵoj en Bulgario kaj Pollando montras, ke niaj E-movadoj en siaj kulturaj programoj koncentras sian atenton al:

— disvolvo de la tradicio de kultura kreado en Esperanto;

— eblecoj de la Internacia Lingvo en la popularigo de valoraj atingoj de la propraj kulturoj kaj la kulturoj de aliaj landoj;

— internaciismaj edukvaloroj, devenantaj de la rekta interkultura interŝanĝo de valoroj kaj ideoj.

Dum la 60-aj kaj 70-aj jaroj estiĝis favoraj kondiĉoj por persona interŝanĝo. En la sesdekaj jaroj multaj bulgaraj junaj esperantistoj partoprenis multnombrajn seminariojn, organizitajn fare de Pola E-Junularo en Gdansk, Torun, Bydgoszcz, Varŝovio kaj reciproke polaj esperantistoj partoprenis bulgarajn tendarojn kaj laborbrigadojn. Gravan helpon en la persona ligoj faris la presorganoj „Bulgara Esperantisto" kaj „Pola Esperantisto", kiuj senpage publikigis korespond-dezirojn.

La lastan jardekon ekdominis amasa E-turismo. Pro sia komenca, organiza kaj memlernada periodo tiu ĉi turismo donas tiom da bonrezultoj, kiom da malsukcesoj — el vidpunkto de Esperanta etoso. Por plibonigi la situacion la pola turisma oficejo „Esperantotur" diferencigis la turismajn servojn — por esperantistoj kun E-programo kaj per Esperanto por neesperantistoj. Ankaŭ la bulgara flanko forte strebas plibonigi la kondiĉojn por E-turismo, konstruinte en Pisanica belan, modernan E-kursejon.

La disvastigo de la organizaj kaj personaj kontaktoj inter la polaj kaj bulgaraj esperantistoj estas gravaj, ĉar tiu procezo ebligas reciprokan interkonatiĝon, ligiĝon de emociaj sentoj kaj amikaj agoj. Do, ĝi ebligas formadon de humaneca personeco surbaze de lainternaciisma spirito.

DIMITĂR PAPAZOV:

## LA LABORISTAJ ESPERANTISTOJ LAŬ LA NOVA DIMITROV'A VOJO

La 19-an de majo 1934 en Bulgario estis farita ŝtatpuĉo. Ekregis la registaro de Kimon Georgiev, kies programo unuigis parton de la oficiroj kaj reprezentantoj de la burĝa intelektularo. Ĝi likvidis ĉiujn partiojn kaj komencis senindulgan kampanjon kontraŭ la komunista kaj laborista movado. La plimulto de la progresemaj aktivuloj estis persekutata kaj devis sin kaŝi de la polico. Tio rilatis ankaŭ la kadrojn de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA), kiuj laboris ĉe tre malfacilaj kaj danĝeraj kondiĉoj.

La estraro de Komunista Partio, estante kaptita de sekteco, decidis, ke en la lando komenciĝas revolucia krizo. De tiu pritakso dependas ankaŭ la estonta laboro de BuLEA, kies aktivuloj malgraŭ la malfacilaĵoj provas efektivigi ligon kun ĉiuj ĉekcioj, direkti kaj gvidi ilin (okazas kunsido de CK de BuLEA, ekaperas bulteno). En Plovdiv kaj Varno oni donas instrukciojn pri reorganizo de la agado ĉe la novaj kondiĉoj.

En aŭgusto 1934 en la ĉirkaŭaĵo de v. Kuklen, regiono de Plovdiv, okazis la II Sudbulgara Konferenco de BuLEA, kiun ĉeestis delegitoj el la distriktoj de Plovdiv, Pazarĝik kaj Stara Zagora. La Konferenco decidis, ke oni komencu eksterleĝan laboron ĉe la novaj kondiĉoj. Ĝi komisiis al la Distrikta Komitato en Plovdiv eldoni gazeton „Sturmulo", distribuotan en Sud-Bulgario. Oni akceptis ankaŭ rezolucion kontraŭ la puĉista registaro. La agado de BuLEA-sekcioj post la puĉo en 1934 estis celkonformaj. La ĉefa formo de la batalo de BuLEA estis la prespropagando kaj diskonigo de la vero pri la faŝistaj regantoj pere de la internacia korespondado.

En la antaŭvespero de la 21-a Bulgara E-Kongreso en 1935 la restintaj en laŭleĝeco membroj de CK de BuLEA pritaksis la cirkonstancojn kaj decidis, ke la membroj de BuLEA devas aliĝi al BEA kaj eklabori kune kun la neŭtralaj esperantistoj. La decido pri kunlaboro de la membroj de BuLEA kaj BEA estas grava paŝo sur la vojo le leninismo kaj montras ĝustan komprenon rilate kombinon de la laŭleĝaj kaj eksterleĝaj laborformoj. La laboro de la komunistoj-esperantistoj en la politike neŭtrala BEA estas la unua eksperimento, kiu donas esperigajn rezultojn.

La decidoj de la VII Kongreso de Kominterno konfirmas la ĝustan vojon, laŭ kiu ekiras la komunistoj-esperantistoj. Tio instigas ilin ankoraŭ pli aktive kunlabori kun la neŭtralaj esperantistoj kaj plenumi siajn idealojn. La komunistoj-esperantistoj aliĝas al BEA, prenas ties gvidadon en siajn manojn kaj transformas ĝin en bazon por amaslaboro. La kursoj, la variaj kultur-amasaj aranĝoj transformas BEA-n en progreseman organizon, kiu aktive partoprenas en la batalo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo.

CANKO MURGIN:

## SOCIA OPTIMISMO DE LA BULGARA ESPERANTO-MOVADO (1936—1944)

La tendenco de demokrateco en la bulgara E-movado tre klare aperis en la lastaj preskaŭ dek jaroj de kapitalisma Bulgario. La ekstreme negativa starpunkto de faŝismo kontraŭ la internacilingva movado konkrete kontribuis, por ke la esperantistaro okupu sindefendan kaj rezistan pozicion. Ĝi simpatiis al la tendenco pri starigo de unueciga fronto de la kontraŭfaŝismaj kaj kontraŭmilitaj fortoj de la homaro. Kion oni faris en Bulgario?

Oni favore adoptis la agadon de Bulgara Laborista Partio post februaro 1936 por starigi unuecan kaj popolan fronton inter la kontraŭfaŝismaj politikaj par-

tioj en Bulgario. Tio tre favoris la rapidan kaj grandskalan unuecigon de la bulgara esperantistaro en demokratigitan organizon — Bulgara Esperantista Asocio. „Bulgara Esperantisto" estis afable akceptita kiel komuna organo kaj ĝia abonantaro rapide kreskis. En la sama 1936 estis organizitaj komunaj pacmitingoj de esperantistoj en Sofio (en marto) kaj en Varno (en aŭgusto). Ankaŭ la membraro de BEA impete kreskis. En 1940 tamen malkreskis pro postuloj fare de la polico pri eksigoj de laboristaj esperantistoj en majo 1939.

Estis enkondukitaj novaj metodoj de agado: planado de la entreprenoj, eldonado de „Mur-gazeto" en Esperanto, praktikado de „Ĵurnalo parolanta" en oficialaj kunvenoj, ekskursoj, grupaj vizitoj; kunlaboro kun samnivelaj organizoj: pacifismaj, kontraŭmilitaj, abstinenculaj, kulturklerigaj, junularaj, kooperaj grupoj k.a. Vigliĝis la individua korespondado kaj oni enkondukis kolektivan korespondadon. Komenciĝis regulaj E-elsendoj de Radio Sofio kaj sporadaj elsendoj de Radio Varno kaj iufoje eĉ de Radio Stara Zagora. En 1937 la ĉiutaga ĵurnalo „Zarja" konsentis publikigi semajne „E-paĝon". Tian paĝon en 1938 malfermis ankaŭ ĵurnalo „Nova kambana".

Por popularigi la bulgaran belliteraturon konsiderinde kontribuis Ivan Krestanov, ADA, Hristo Gorov, David Sasonov, Krâstju Georgiev, Nikola Vasilev k.a. Al la muzoj de D.Zlatarski, Hr. Gorov kaj As. Grigorov aliĝis la muzo de la plej elstara neŭtralisma poeto Petâr Jordanov. Dum tiu periodo aperis novaj E-poetoj — Marin Bâlgarenski, Violin Oljanov (Zefiro), Georgi Dikovski, David Sasonov.

Post la ĉesigo de „BE" Dimitâr Ivanov el Ruse aranĝis eldonon de „Revuo-Bulteno, organo de Bulgara E-Movado" en Budapeŝto. En 1943 aperis tri numeroj en eldonkvanto po mil ekzempleroj. En mallongaj raportoj oni skizis la tiaman staton kaj lerte pentris la estonton.

La 27-a Bulgara E-Kongreso—lasta kongreso ĉe kapitalismo, okazis en Loveĉ (1940) ne sub la gvido de CK de BEA, sed sub la gvido de la redakcio de „BE" kaj ties kunlaborantoj. Ekde 1940 la E-movado estis plue gvidata de tiu kromcentro.

En 1944 en iuj E-societoj kaj -grupoj oni eldonis unuopajn numerojn de manuskriptaj gazetoj. En v. Galiĉe aperis du numeroj de tia gazeto. Tiun manieron de eldonado oni praktikis plejparte en la grupoj de malliberigitaj esperantistoj en Sofio, Sliven, Veliko Târnovo k.a.

En la periodo 1936—1944 la bulgaraj esperantistoj spertis la fruktojn de unuecfronta agado. La grandega plimulto de la bulgara esperantistaro apartenis al laboristaj esperantistoj kaj multaj el la honestaj neŭtraluloj adoptis aŭ konsiderinde proksimiĝis al la koncepto pri unuec fronta agado. Ideologoj kaj plej ardaj realigantoj de unuecfronta agado estis kaj estas la laboristaj esperantistoj N. Aleksiev, As. Grigorov, Hr. Gorov, Kr. Karucin, Iv. Keremidĉiev kaj V. Oljanov.

IVAN KEREMIDĈIEV:

## LA BULGARA E-MOVADO EKDE 1940 ĜIS LA 9. IX. 1944

La komenciĝinta aŭtune de 1939 Dua Mondmilito ekde 1940 furiozis ankoraŭ pli kruele. La barbaraj hitlerofaŝistaj milittrupoj konkeris unu post la alia la landojn en Centra kaj Okcidenta Eŭropo. La ekonomiaj, kulturaj kaj politikaj ŝtatrilatoj ekstagnis. Pro tio ekstagnis ankaŭ la E-movado en la mondo, kaj en Bulgario pro la persekutoj de nia reakcia monarko-faŝista registaro. Ektimis kaj preskaŭ ĉesis aktivi iuj el la membroj de CK de BEA.

Pro la malboniĝinta gvidado fare de CK de BEA kreiĝis helpcentro el E-aktivuloj (Ang. Ivanov, N. Nanov, V. Ĉoĉov, V. Oljanov, St. V. Stojanov, Iv. Iliev, Kirilov, Batakliev k.a.). fronte de Ivan Keremidĉiev. En 1940 ĝi transformĝis en parelelan, eĉ en gvidantan kromcentron de BEA. CK de BEA havis sian organon „Bulgara Esperantisto", kaj la kromcentro havis kiel sian tribunon la E-paĝon en ĵurnalo „Zarja", kiu ĉiusemajne respegulis la agadon de la E-movado en la lando, kaj donis direktivojn por pli vigla laboro ĉe la streĉa monda situacio.

La kromcentro eĉ sen oficiala permeso de CK de BEA kaj kun silenta aprobo de iuj CK-anoj iniciatis, organizis kaj gvidis du grandajn manifestaĵojn — la landan E-renkontiĝon en Plovdiv en majo 1940, kun pli ol 200 partoprenantoj, kaj la 37-an Bulgaran E-Kongreson la saman jaron en Loveĉ. Ĉar neniu membro de CK de BEA kuraĝis partopreni la Kongreson, Ivan Keremidĉiev legis la kongresajn raportojn kaj dokumentojn, kaj fakte gvidis la Kongreson.

Post la Kongreso en Loveĉ la agado de la E-societoj konsiderinde pliviglíĝis. Ili disvolvis sian organizan, amasan kaj kulturklerigan agadon en intima kunlaboro kun la aliaj amasaj laboristaj, abstinenculaj, turistaj kaj kulturaj organizaĵoj. Ĉar ili ne havis grandparte klubejojn, ili aliĝis al la agado de la legejoj — aranĝis kursojn, ekskursojn, amuzajn vesperojn.

La hitlerofaŝistoj invadis ankaŭ Bulgarion kaj la E-paĝo en ĵ. „Zarja" ĉesis aperi. Bonŝance en la fino de 1940 redaktoro de „BE" estiĝis d-ro Stojan Ĝuĝev kaj la enhavo de la asocia organo pliboniĝis. Kaŝita kunredaktoro estis Keremidĉiev. Ili ambaŭ transformis la gazeton en solidan porpacan kaj kontreŭfaŝisman tribunon. En 1941 kaj 1942 Keremidĉiev sukcesis eldoni du antifaŝismajn esperantaĵojn — „Popola kalendaretó Esperanto — 1941" kaj „Novjara folio", ambaŭ necenzuritaj.

Venis malserenaj tagoj. Iuj plej viglaj esperantistoj en Sofio (Asen Grigorov, Angel Ivanov k.a.) estis arestitaj kaj ĵetitaj en malliberejon. Multaj aliaj sofiaj kaj provincaj samideanoj ankaŭ estis malliberigitaj, murditaj aŭ estiĝis partizanoj kaj kiel tiaj pereis — N. Ŝopov, T. Sofroniev, D. Petrov, St. Edrev, Hr. Karpaĉev, D. Kaljaŝki, V. Peeva, P. Miĥajlova kaj multaj aliaj E-aktivuloj kaj popolaj herooj. Venis alia kruela bato — la malpermeso de nia organo „BE" en 1942,

La progresemaj esperantistoj kiel fidelaj filoj de sia popolo, oferantaj sian vivon partoprenis en la bataloj por liberigo de sia amata patrolando el sub la faŝisma kaj kapitalisma jugo. La liberama bulgara popolo venkis dank'al la decida helpo de la brava Soveta Armeo. Venis la glora Naŭa de Septembro, kiu malkovris vastajn horizontojn por socialisma konstruado. Por la bulgaraj esperantistoj estiĝis bonegaj kondiĉoj por E-aktivado kaj porpaca laboro.

MANOL ĈOLEV:

## HISTORIO DE LA E-MOVADO EN ĈEPINO-VALO

Interesa kaj riĉa estas la historio de la E-movado en Ĉepino-valo. La ideo pri la Internacia Lingvo Esperanto aperis si tie jam antaŭ la Unua Mondmilito — en 1914. Kaj nun celebrante la 40-jariĝon de nia socialisma revolucio, ni celebras ankaŭ la 70-jaran datrevenon de la E-movado en Ĉepino-valo.

La fondinto de la E-movado ĉi tie estas Nanjo Ognjanov, poŝtestro en v. Rakitovo kaj poste en v. Lâĝene. En 1914 li instruis Esperanton al kelkaj instruistoj kaj inteligentuloj. E-kurson Ognjanov gvidis la sekvan jaron en Lâĝene. La eksplodinta Unua Mondmilito malhelpis, ke li finu la kurson —li estis

mobilizita.

En 1921 en Lâĝene komenciĝis la konstruado de sanatorio de ftizmalsanaj instruistoj. Gvidanto de la konstrulaboroj estis inĝ. Sotir Teŝev, fervora esperantisto. Li organizis E-kurson kaj daŭrigis la poresperantan agadon de Ognjanov. Esperanto estiĝis vaste konata en Ĉepino-valo. En 1923 Manol Ĉolev, instruisto en v. Kostandovo, malfermis E-kurson, en kiu partoprenis la tuta instruista kolegaro.

Maturiĝis la kondiĉoj por fondo de la unua E-societo. En 1925 kunvenis ĉiuj esperantistoj el Ĉepino-valo kaj fondis en v. Lâĝene E-societon „Ĉepino". Ĝi organiizis propagandajn prelegojn de d-ro Gavrijski pri la Internacia Lingvo. La membroj de la societo preparis teatraĵon, kiun prezentis en Batak kaj en pli grandaj vilaĝoj de la valo.

Dimitâr Peŝterski gvidis E-kurson en v. Kamenica, en kiu partoprenis membroj de la Laborista Junulara *Unuiĝo (RMS) — Vela Peeva,* Stoju Kalpazanov, Nikola Vlaĥov, Stoil Gâlâbov, Gera Peeva k.a. La gejunuloj entuziasmiĝis kaj komencis viglan korespondadon. Ĝi helpis ilin ne nur informiĝi pri la politika situacio en la mondo, ĉed ankaŭ plialtigi sian pretecon batali kontraŭ la faŝismo. La tuta junulara E-agado estis subigita al la batalo kontraŭ faŝismo — raportoj pri politikaj temoj, vesperamuzoj, spektado de sovetaj filmoj.

Multaj el la esperantistoj estiĝis partizanoj: Vela Peeva. St. Kalpazanov, G. Peeva, St. Gâlâbov, N. Vlaĥov, D. Kadreeev, Vela Peeva, Stoju Kalpazanov, kaj Angel Ĉopev oferis sian vivon en la batalo.

Depost 1945 aktivan E-agadon disvolvis Nikola Godev, instruisto en v. Lâĝene. Komence de 1945 en v. Kamenica dank' al iniciato de Nikola Godev kaj Dimitâr Peŝterski estis fondita E-societo „Stoju Kalpazanov". Estis organizita amasa kurso, gvidata de Peŝterski.

Pro malfavoraj kondiĉoj la E-movado en Ĉepinovalo ekstagnis post 1949. En 1958 estis fondita nova E-societo „Stoju Kalpazanov" en urbo Velingrad. Post 1960 nia E-societo aktivas. Ĉiujare malfermiĝas kursoj por civitanoj kaj gelernantoj. Nun la societo konsistas el 90 membroj. Pro sia sukcesa agado en la 40-a Bulgara E-Kongreso ĝi okupis unuan lokon en la konkurado inter la malgrandaj urboj en Bulgario.

IVANKA RADKOVA:

## REMEMOROJ PRI TIU TEMPO

Kvardek jarojn libero! Kvardek jarojn supreniro! Realiĝis la revoj, pro kiuj oferis sian vivon miloj da gefiloj de nia popolo. Koncize mi rakontos, kiel mi, la ordinara bulgara virino, partoprenis en la batalo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo.

Mi naskiĝis en 1918 en urbo Nevrokop (nun Goce Delĉev) en revolucia familio. Mia patro, simpla laboristo, partoprenis la makedonan nacíliberigan batalon kontraŭ la otomana jugo, poste estiĝis membro de BKP kaj restis fidela al la komunismaj idealoj ĝis sia morto. Pro lia komunista agado li devis transloĝiĝi kun sia familio — unue al Bratanica, distrikto de Pazarĝik, kaj poste al v. Vetren Dol, sama distrikto.

Nia familio vivtenis sin per tabak-kultivado —ĉefa okupo de la loĝantaro en la regiono tiutempe. En 1932 mi aliĝis al la komunista infangrupo en la vilaĝo. Nikola Radkov el v. Varvara instigis nin, grupon da klaskonsciaj infanoj, lerni Esperanton. La lingvon instruis al ni la instruisto Boris Nastev. Por mi estis interese lerni Esperanton kaj mi estis diligenta. Mi daŭrigis la lernadon de la Internacia Lingvo sub la gvidado de Petâr Kapitanski, lignisto en nia vilaĝo.

Post kiam mi finis bazan lernejon mi ne povis plu lerni, ĉar mia familio estis tre malriĉa. Mi eklaboris unue kiel purigistino, kaj poste kiel telefonistino.

En 1936 oni akceptis min en la vicojn de Laborista Junulara Unuiĝo (RMS). Mi altiris multajn vilaĝajn knabinojn al la popola legejo, kolektis monon por helpi la politikajn malliberulojn kaj persekutatajn kamaradojn. En amatora teatra trupo ĉe la legejo mi ofte ĉefrolis en revoluciaj teatraĵoj.

En novembro 1940 mi edziĝis al Nikola Radkov, juna viro, tre sindona al la ideoj de komunismo. Komence de 1941 mi forlasis la oficon en la poŝtejo, ĉar mi devis partopreni ankoraŭ pli aktive en la konspira agado.

Min trafis la plej granda ĝojo — en oktobro 1941 mi fariĝis patrino. Mi naskis filon. Post nelonge mi lasis al mia patrino varti la bebon kaj dediĉis ĉiujn miajn fortojn al la liberiga batolo. Mia edzo estiĝis partizano. En la policejo de Pazarĝik oni pridemandis min pri la partizanoj, batis min ĝis mi perdis la konscion. La 1-an de februaro 1944 venis la kruela sciigo, ke pro perfido mia edzo estis mortigita. Oni denove arestis min, kondukis min al la policejo de v. Varvara kaj batis min, por ke mi denuncu, kie estas la ceteraj partizanoj. Miaj familianoj trafis en la liston de danĝeraj homoj, kiujn la regpotenco planis likvidi.

La antaŭenmarŝo de la Soveta Armeo fiaskigis la planojn de la faŝistaj regantoj. La 8-an de septembro 1944 ni akceptis la politikajn malliberulojn, kaj la sekvan tagon — 9-an de septembro, ni proklamis la popolan regpotencon en v. Vetren Dol.

# EĤOJ

„La Scienc-Praktika Konferenco „40 jaroj de la socialisma revolucio en Bulgario" ebligis al mi ekkoni detale kiel partoprenis esperantistoj en la laborista kaj komunista movado en via lando kaj kiajn kontaktojn ili havis kun alilandanoj.

La esencon de la Konferenco por mi tre bone respegulas la titolo de la baza raporto de Ĥristo Gorov: „La idealo de la bulgaraj esperantistoj realiĝis". La kvar raportoj de bulgaraj esperantistoj (Ĥr. Gorov, C. Murgin, Iv. Keremidĉiev, Ivanka Radkova) prezentis tre klare la kontinuecon en la laboro de la komunista laborista movado ekde la komenco ĝis la venko de la socialismo. El tiuj raportoj mi eksciis pri veraj herooj de la bulgara popolo, kiuj estas sekvindaj ekzemploj por la junaj generacioj.

Krom partopreni en la Konferenco ni, la eksterlandaj gastoj, havis eblecon konatiĝi kun belaj kaj interesaj vidindaĵoj: Sofio, Velingrad, Batak, Pazarĝik, Plovdiv, Smoljan kaj Pisanica. Ili konvinke montras la varian kulturan kaj historian riĉecon de Bulgario",

**OSZKAR PRINCZ,**
**Hungario**

„La Konferenco havis riĉan kaj varian enhavon. Velingrad donis multajn partizanojn-esperantistojn. Aparte impresis min la vivo kaj agado de la herooj Vela Peeva kaj Stoju Kalpazanov. La vojaĝo tra Pazarĝik-distrikto, al Plovdiv, Smoljan, Pisanica kaj returne al Sofio estis interesa kaj programriĉa.

Ni dankas al CE de BEA kaj la organizantoj el Pazarĝik-distrikto, kiuj amike kaj frate renkontis nin. Ni bondeziras grandajn sukcesojn en via Esperanto-agado".

**ELENA OSTOIA**
**ANA CURIMAN**
**Rumanio**

„De kelkaj jaroj mi interesiĝas pri la bulgara historio, kulturo kaj pri la bulgara E-movado. Min interesas la literaturaj kaj precipe la sciencaj eldonaĵoj de BEA. De ili mi havas eblecon ekkoni la historiajn eventojn de la bulgara popolo, ekkompreni la direktojn de la bulgara E-movado — dum la revolucia kaj kontraŭfaŝisma epoko kaj dum la 40-jara konstruado de nova socialisma ŝtato.

Mi opinias, ke la kontribuo de la vialanda E-movado ĉefrolas precipe en la kultura disvolvo de socialisma Bulgario, kaj ankaŭ sur la eduka kampo, kreante internaciismajn konscion kaj sentojn. Tiujn ĉi funkciojn bone elmontris la Scienc-Praktika Konferenco „40 jaroj de socialisma revolucio en Bulgario" en Velingrad, kiu estis enhavoriĉa kaj instrua.

Multon mi eksciis pri la historio de Velingrad kaj ĝia regiono, pri la herooj-antifaŝistoj kiel Vela Peeva. Propraokule mi spertis la dinamikan socian kaj kulturan evoluon de Velingrad-regiono.

Mi havis ĝojigajn personajn travivaĵojn pro renkontoj kun malnovaj miaj bulgaraj amikoj kaj pro la amika E-etoso, kiu helpis al mi kontakti kun multaj nekonataj esperantistoj"

**TADEUSZ EJSMONT,**
**Pollando**

„Estas malfacile priskribi ĉiujn impresojn kaj travivaĵojn dum la vojaĝo tra Bulgario okaze de la Scienc-Praktika Konferenco en Velingrad. Veturante mi admiris la kolosan konstrulaboron de la bulgara popolo. La tuta lando estas konstruejo, sur kiu aperas novaj loĝdomoj, fabrikoj, ŝoseoj kaj aliaj kolosaj projektoj. Vizitanto el la Okcidento ne povas nei la strebojn por plialtigo de la vivnivelo de la loĝantaro.

La Konferenco, organizita en la bela urbo de la heroino-esperantistino Vela Peeva, impresis al mi per la kontribuaĵoj de elstaraj esperantistoj.

Vere impona estas la E-kursejo en Pisanica. Alte en la montaro lumas la verda stelo, montrante, ke tie ĉi troviĝas al unika E-kursejo en la mondo.

Rimarkinda estas la intima kunlaboro de la bulgaraj esperantistoj kun la Komunista Partio. Tio estas konsiderinda sukceso por la bulgara E-movado, kiu scias, ke paco — Esperanto — socialismo formas unuecon".

**FRANZ SCHICK**
**redaktoro de E-gazeto**
**„Internaciisto", Aŭstrio**

## KAZAĤIO — BULGARIO: E-LIGOJ

Mi tre bone memoras la tagojn, kiam la Soveta Armeo liberigis la bulgaran popolon en septembro 1944. Kiel oficiro en la stabo de Unua Ĉebalta Fronto, mi havigis oficajn pakaĵojn al la stabo de 3-a Ukraina Fronto, al la armea generalo (pli poste — marŝalo de Sovetunio) F. I. Tolbuĥin.

En la 60-aj jaroj, post defendo de mia kandidata disertacio, mi komencis okupiĝi pri esplorado de la internaciaj ligoj de la kazaĥaj laboruloj kun la alilanda proletaro. Laborante en la arkivoj de USSR kaj Bulgario, mi konstatis la grandan rolon de la revoluciaj laboristaj E-organizaĵoj por la evoluo de tiuj ligoj dum la 20-aj — 30-aj jaroj.

Tiel komenciĝis mia amikeco kun la gvidantoj de BEA kaj eminentaj agantoj de la internacia E-movado en la pacbatalo — N. Aleksiev, Ĥr. Gorov, Ĥr. Kanev, Iv. Keremidĉiev, D. Papazov ka. Dank' al la kunlaborado kun ili mi povis trovi en la arkivoj dokumentojn kaj kolekti rememorojn de veteranoj de la laborista movado, malkovran tajn la senperajn kaj intimajn kontaktojn de laboruloj el USSR kaj Bulgario dum la 20-aj — 30-aj jaroj kaj ankaŭ nun. La eltrovitaj materialoj permesis al mi prezenti min per raportoj antaŭ la organizitaj de BEA en la 80-aj jaroj sciencaj konferencoj, dediĉitaj al la 100-jara datreveno de la naskiĝo de G. Dimitrov, al la 75-jariĝo de BEA, al la 60-jariĝo de la Septembra Ribelo en 1923, al la 40-a jubileo de la socialisma revolucio en Bulgario, prepari por publikigo en USSR kaj Bulgario manuskriptojn de libroj.

Nun la soveta popolo, inkluzive la laborulojn de Kazaĥio vaste notas la 40-an datrevenon de la socialisma revolucio en Bulgario. En industriaj entreprenoj, en sovĥozoj kaj kolĥozoj, en lernejoj kaj kluboj, oni okazigas kunvenojn, dediĉitajn al la historiaj konkeroj de la bulgara popolo.

**Doc. JOSIF PORTNOJ**

## SOLENA CELEBRO DE LA 75-JARIĜO DE NIKOLA ALEKSIEV



La 22-an de junio 1984 en unu el la salonoj de la Centra Konsilantaro de Bulgaraj Profesiaj Unuiĝoj (BPU) oni organizis solenan celebron de la 75-jariĝo de Nikola Aleksiev, multjara sindikata funkciulo, honora prezidanto de MEM kaj redaktoro de gazeto „Pacaktivulo". Ĉeestis multaj liaj kolegoj kaj amikoj el la Centra Konsilantaro de BPU kaj el la Klubo de Veteranoj-Sindikatanoj.

Koncizan raporton pri la vivo kaj laboro de Nikola Aleksiev kaj Nikola Caĉev faris Kosta Andreev, sekretario de CK de BPU. Estis esprimita la granda estimo al tiuj kamaradoj, kies agado ĉiam estis ligita kun la ideoj kaj bataloj de la Bulgara Komunista Partio kaj de la bulgara popolo, kun la internacia pacmovado. Sian tutan vivon ili dediĉis al la batalo por venko de la socialismo en nia lando. La raportanto memorigis, ke ekde sia junaĝo Nikola Aleksiev partoprenas en la rezistado de la bulgara popolo kontraŭ faŝismo. Estante lernanto, li eniras la vicojn de Komsomolo, dum la studentaj jaroj Aleksiev partoprenas en la studentaj bataloj, poste estas redaktoro de gazeto „Studenta Tribuno". Pli ol 12 jarojn li estas en malsanulejo.

Nikola Aleksiev estis distingita per Ora Signo de la Centra Konsilantaro de Bulgaraj Profesiaj Unuiĝoj. Oni tralegis gratulleteron, subskribitan de Petâr Djulgerov, prezidanto de CK de BPU.

**LIBERTARIA MLADENOVA**

### SALUTOJ

**Letero de TODOR ĴIVKOV, ĝenerala sekretario de Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio kaj prezidanto de la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario:**

*Kamarado Aleksiev,*

*Al mi estas agrable saluti Vin el tuta koro okaze de Via triafoja distingo per ordeno „Georgi Dimitrov" lige kun Via 75-jariĝo.*

*La alta distingo estas plua granda kaj merita esprimo de rekono al Vi — la abnegacia komunisto, partopreninta la nelegalan batalon, spertinta la suferojn de faŝistaj malliberejoj. Ĝi estas nova pruvo pri Via senlaca agado por triumfo de la socialismo en nia lando, por evoluigo de la Bulgaraj Sindikatoj, por plifirmigo de la nobla esperantista movado kaj defende al la monda paco.*

*Mi sincere bondeziras al Vi, kara kamarado Aleksiev, firman sanon, feliĉon kaj novajn sukcesojn en Via fruktodona soci-politika agado.*

*Gratulojn kaj bondezirojn por longa vivo!*

*la 29-an de junio 1984* *T. ĴIVKOV*

**De la Ministra Konsilantaro de PR Bulgario**

*Estimata kamarado Aleksiev,*

*Mi salutas Vin pri la feliĉa 75-a datreveno kaj pri Via distingo per ordeno „Georgi Dimitrov".*

*Akceptu korajn bondezirojn pri firma sano, vigleco kaj feliĉa longvivado!*

*ĈUDOMIR ALEKSANDROV,*
*Unua vicprezidanto de la*
*Ministra Konsilantaro*

**De BEA-Estraro**

*Ni salutas Vin plej kore pri la alta ŝtata distingo — ordeno „Georgi Dimitrov" kaj bondeziras al Vi firman sanon kaj novajn kreosukcesojn!*

*Portu longe tiun altan distingon!*


*Centra Estraro de BEA*

---

*La Ŝtata Soveto de PR Bulgario la 19an de junio 1984 distingis per la titolo „Laŭreato de Dimitrov-premio" la famekonatan muzikologon-folkloriston kaj vicprezidanton de la Esperanta Akademio prof. d-ro STOJAN STOEV GUGEV el Sofio pro lia verko „Bulgara popolmuziko", surbaze de paragrafo 93, punkto 24 el la Konstitucio de PR Bulgario.*

*Per dekreto 1636/29. 05. 1984 la Ŝtata Konsilantaro de PR Bulgario distingis la elstaran esperantiston KIRIL DRAJAV el Sofio per ordeno „Ruĝa Standardo de la Laboro" pro multjara krea kaj socia agado en la sfero de kulturo kaj lige kun lia 80-jariĝo.*

# D-RO NIKIFOR BABAĈEV



D-ro Nikifor Babaĉev naskiĝis la 3-an de februaro 1899 en vilaĝo Petriĉ, distrikto de Pazarĝik (nun distrikto de Sofio). La unuajn 4 klasojn li lernis en la elementa lernejo en sia naskiĝvilaĝo. Poste li lernis en Panagjuriŝte, kaj la lastajn du klasojn de la gimnazio — en Sofio. Superan klerecon pri ĥemio li ricevis en Aŭstrio, urbo Graz, kie, post ellaboro de disertacio, ricevis titolon „doktoro de ĥemio".

En 1925—1926 d-ro Babaĉev estis staĝanto-instruisto en III Sofia Gimnazio (nun 18 Politeknika Mezlernejo „Kiril i Metodi"). Tamen li ne fariĝis instruisto, sed prenis vojon al la industrio, kie li laboris kaj samtempe studis juron en la Sofia Universitato kaj post la necesa praktiko ricevis advokatajn rajtojn. Tiel N. Babaĉev fariĝis juristo, sed tamen sian tutan vivon li dediĉis precipe al la ĥemio kaj pli konkrete al la ĥemio de plantoleoj.

Pro lia longjara kultur-kleriga, socia kaj scienca agado d-ro Nikifor Babaĉev estis dekorita per la ordenoj „Kiril i Metodi" — II grado kaj „Ruĝa Standardo de la Laboro". Ĉi-sube legu la rememorojn de d-ro Babaĉev pri lia E-agado. La materialon ni publikigas lige kun lia 85-jariĝo, kiu estis solene notita de la sofiaj esperantistoj en junio j.k.

Dum mia tuta vivo mi ne ĉesis interesiĝi pri Esperanto. Kaj jen kiel mi estiĝis esperantisto. En 1915 en mia vilaĝo Petriĉ ĉefo de nia poŝtoficejo estis Vasil Andreev el Pirdop. Li estis juna homo kaj bona amiko de nia familio. En la komenco de oktobro li decidis edziĝi. Lia fianĉino Zlatka Krâstanova estis ankaŭ el Pirdop. Malgraŭ ke mi estis tre juna, lernanto en dua klaso de la gimnazio en Panagjuriŝte, estis decidite, ke mi estu la baptano de la juna paro. La geedziĝo okazis en Pirdop. Tie mi konatiĝis kun la frato de la junedzino — Ivan Krâstanov. Por unua fojo mi aŭdis la vorton Esperanto. Krâstanov diris al mi, ke Esperanto estas „lingvo internacia". Li parolis multe pri Esperanto kaj promesis sendi al mi libron por ĝia ellernado. Post nelonge li sendis al mi en Panagjuriŝte 10 ekzemplerojn de „Manlibro de Esperanto", kies aŭtoro estis li mem — Eldonaĵo BEK — 1912.

8 ekzemplerojn mi donis al diversaj junuloj-lernantoj kaj 2 retenis ĉe mi. Laŭ unu el tiuj 2 ekzempleroj de la „Manlibro" lernis Esperanton la pli juna ol mi Stojan Guĝev el Panagjuriŝte (nun profesoro Stojan Guĝev).

La rondo de la dezirantoj en Panagjuriŝte lerni Esperanton baldaŭ plivastiĝis. Estis necesaj pliaj „Manlibroj". Ivan Krâstanov, kun kiu mi subtenis ligojn, sendis al mi ankoraŭ 10 ekzemplerojn, kiujn mi disdonis al dezirantoj lerni Esperanton.

Ivan Krâstanov vojaĝis Germanujon. La edzino estis el Germanujo. Tio ĉi estis en la fino de 1925—1916. En la komenco de septembro 1918 — 1919 mi ricevis poŝtkarton-fotografaĵon de Krâstanov el Lejpcigo, Germanujo. Li deziris ricevi la sumon, kiun mi ŝuldis al



**Poŝtkarto sendita al d-ro N. Babaĉev de Ivan Krâstanov el Lejpcigo, la 6-an de septembro 1916. Sur la karto: Ivan Krâstanov kun lia fianĉino.**

li. Ĉio ĉi estis skribita sur la sama poŝtkarto, kiu estis adresita al mi en vilaĝo Petriĉ, sed poste estis farita korekto: strato Ŝipka n-ro 3, Sofio. Tio ĉi estis mia adreso en Sofio, kie mi daŭrigis mian lernadon en I Knaba Gimnazio.

Mia opinio estas, ke Ivan Krâstanov estis eminenta esperantisto. Tial tiu ĉi fotografaĵo, kiun mi 66 jarojn havis ĉe mi, devas esti en la Esperanta muzeo.

En Sofio mi fariĝis membro de la popola legejo „Aleko Konstantinov". Baldaŭ mi partoprenis en la gvidado de la legejo kaj longan tempon estis ĝia prezidanto (nun honora prezidanto). Dum la jaroj 1950—1960 en la legejo okazis kunvenoj de sofiaj esperantistoj.

Konklude mi devas diri, ke mi ne havis eblecon viziti kursojn de Esperanto. Miaj instruistoj de la Lingvo Internacia estis mi mem kaj la „Manlibro de Esperanto" de Ivan Krâstanov. Tiu ĉi „Manlibro" estis ĉe mi ĉiam kaj ĉie, ankaŭ dum la jaroj, kiam mi studis en fremdaj landoj.

Mi vivas kun la kredo, ke Esperanto fariĝos plej grava faktoro por la internacia solidareco: ĝi fortikigos la sinceran strebon de la homaro sur la tuta terglobo al paco, amikeco kaj forigo de la sensencaj kaj malsaĝaj konfliktoj.

---

# NOVA GRAVA PAŜO

**La bulgara Ministerio de Popola Klerigado enkondukis devigan instruadon de Esperanto en la tri lastajn klasojn de VIII Unueca Meza Politeknika Lernejo „Vasil Levski" in Sofio.**

Depost 1981 Esperanto estas fakultative instruata en la bulgaraj mezlernejoj konforme al la dekreto de la Ministerio de Popola Klerigado. La Internacia Lingvo tamen restis ĉiam ekster la regula plano por deviga instruado en la mezlernejoj. Tiu ĉi situacio ne kontentigis la aktivulojn de nia movado.

Laŭ iniciato de Neli Ĥoleviĉ, estraranino de la Sofia regiona esperantista societo „Ivan Krâstanov" kaj respondeculino pri laboro kun la junularo, la Centra Estraro de Bulgara Esperatista Asocio faris oficialan proponon al la Ministerio de Popola Klerigado pri enkonduko de Esperanto kiel regula studobjekto (sub formo de eksperimento) en la tri lastajn gimnaziajn klasojn. La Ministerio akceptis tre favore tiun ĉi proponon. Post longa prepara laboro (en kiu krom Neli Ĥoleviĉ partoprenis ankaŭ gek-doj Ĥaĉik Ĥaĉikjan, scienca kunlaboranto en la Instituto por Eksterlandaj Studentoj, Marin Bâcev, lingva metodikisto ĉe Bulgara Esperantista Asocio kaj prezidanto de la Sofia Instruista Esperantista Societo kaj Sijka Peltekova, direktorino de VIII Sofia mezlernejo „Vasil Levski"), la ministerio akceptis la proponon de BEA. Bazante sin sur ties rezolucio, la ĉefsekretario de la ministerio, k. p. sc.[1] Todor Angelov sendis al la lernejo jenan leteron:

*Ministerio de la Popola Klerigado N-ro 6200—30, Sofio, la 11-an de junio 1984*

*Al VIII Unueca Meza Politeknika Lernejo „Vasil Levski", subdistrikto „Ĥr. Botev*

*La Ministerio permesas, ke ekde la lernojaro 1984—1985 estu formita sur eksperimenta bazo speciala lernogrupo en la VIII klaso por instruado de la angla lingvo dum tri lernohoroj semajne kaj de Esperanto same dum tri lernohoroj semajne laŭ studplano ellaborota de la lerneja direkcio.*

*Ĉefsekretario:*
*k. p. sc., T. Angelov*

Tio estas grava sukceso de la E-movado en Bulgario, pri kiu plej grandan meriton havas Neli Ĥoleviĉ. Dum tri lernojaroj — ekde la VIII klaso ĝis la fino de la mezlerneja kurso — grupo de 30—40 gelernantoj studos **regule kaj devige** la Internacian Lingvon. Se la eksperimento sukcesus, ekzistas probableco enkonduki la devigan lernadon de Esperanto ankaŭ en aliajn bulgarajn mezlernejojn kaj post preparo de kvalifikitaj instruistoj — en ĉiujn mezlernejojn — kio egalvalorus oficialigon de la Internacia Lingvo en Bulgario.

Ni esprimas dankon al la direktorino de VIII Politeknika Mezlernejo Sijka Peltekova, kiu tre energie kaj entuziasme apogis nian proponon ĉe la Ministerio kaj donis al ni valorajn konsilojn konekse kun la realigo de la iniciato.

Post Hungario Bulgario estas la dua lando en la mondo, kie la Internacia Lingvo estas oficiale kaj devige instruata en mezlernejoj, kvankam sub formo de pedagogia eksperimento. La cetero dependas de la esperantistoj mem

**Prof. STOJAN ĜUĜEV**

[1] **k. p. sc. — kandidato de la pedagogiaj sciencoj**

---

Por verkado de libro pri la partopreno de bulgara E-junularo en Esperantaj laborbrigadoj ekde 1945 ĝis 1984 ni bezonas materialojn, fotojn kaj informojn. Adreso de la iniciatinto: Ŝterjo Kukuŝev, str. „Ĥ. Dimitâr Asenov" 145—I—ap.1, BG-6000 Stara Zagora, Bulgario.

# EKOLOGIO KAJ PRODUKTADO




Parolas prof. Kalĉev, rektoro de SVIEKO'84

En daŭro de kvar tagoj (28—31. V. 1984) en urbo Sviŝtov okazis la jam tradicia Ekologia Konferenco — SVIEKO'84. Ĝia ĉefa temo estis „Rolo de la ekologia faktoro en la teritoria kaj urba laŭplana organizado de la vivmedio kaj la produktadfortoj". Ĉefaj organizantoj estis la Supera Financa-Ekonomika Instituto „D. A. Cenov" — Sviŝtov, la Bulgara Ekologia Societo, la Komitato por Protektado de la Naturmedio, la Bulgara Esperantista Asocio (BEA) kaj aliaj organizaĵoj. Oficialaj laborlingvoj estis bulgara, rusa, angla, franca kaj Esperanto. En la laboro de la konferenco kun pli ol 100 raportoj partoprenis sciencistoj pri ekologiaj problemoj el pluraj landoj — Aŭstrio, Anglio, Belgio, GDR, Greklando, Pollando, Rumanio, Sovetunio, Hungario, Francio, Nederlando, Ĉeĥoslovakio, Svedio kaj Bulgario.

Dank' al la kunlaboro de la Ekologia Sekcio ĉe BEA, enkadre de la konferenco funkciis Esperanto-sekcio, kie oni diskutis ĝeneralajn problemojn kaj la problemojn de naturmedio. En la laboro de la konferenco oni ne antaŭvidis simultanan tradukadon, tial estis konstatebla malkontento pro malbona interkompreniĝo. Despli evidenta estis la facila senpera laboro, interparoloj kaj kunekzistado de la esperantistoj el ses landoj (Belgio, FRG, Hungario, Anglio, Pollando kaj Bulgario) — entute pli ol 20 partoprenantoj. Speciale por la konferenco BEA kaj la Ekologia Sekcio eldonis du librojn kun sciencaj raportoj: **Ekofuturo**, 420 paĝoj, kaj **Evoluo de la trafiko kaj polucio**, 185 paĝoj. Ili estis parto de la dokumentaro, kiun ricevis ĉiu partoprenanto. Forte impresis la kvalitoj de Esperanto kaj la senperaj kontaktoj inter la esperantistoj. Reprezentantoj de la Bulgara Akademio de Sciencoj kaj de aliaj altrangaj institucioj volis ekscii detalaĵojn pri la apartaj raportoj en **Ekofuturo** kaj esprimis deziron lerni la Internacian Lingvon kaj aktivadi en la Ekologia Sekcio de BEA.

En la E-sekcio de la konferenco raportis: s-ro Jakob (Belgio) — „La societo Spa-Monopol kaj protektado de la ĉirkaŭa medio", prof. Ĥristo Marinov (Bulgario) — „Problemoj de la ekologia futurologio kaj la estonteco de la loĝlokoj", prof. A. Rzymkowsky (Pollando) — „Regiona banko de ekologiaj spacaj informoj", inĝ. B. Leonov (Bulgario) — „La rolo de la scienc- kaj patentteknika informado ĉe ekologiigo de la produktado", doc. G. Grozev (Bulgario) — „Ekologi-ekonomikaj sistemoj: funkciado kaj modeligo". Pri la celoj, aktivado kaj problemoj de la „verdula movado" en Britio parolis f-ino Anne de Boisgelin en sia raporto: „Disvolviĝo de la verda movado en Britio". S-ino Anna Székely (Hungario) informis pri „Influo de transporto sur la ĉirkaŭan medion".

La ĉeesto de la sekretario de ISAE — inĝ. Darbellay, estis speciale utila pro la okazinta intertraktado de organizaj demandoj pri la internacia faka agado kun la estrarano de UEA inĝ. Petâr Todorov.

Dum la kunsidoj kaj la amuzaj vesperoj regis amika etoso, la novaj konatiĝoj firmigis la ligojn inter la partoprenantoj kaj ilian konvinkon, ke al la homoj estas necesaj paco kaj reciproka fido.

La lasta tago estis ekskursa por la eksterlandaj partoprenantoj.

La sekvonta konferenco SVIEKO okazos en 1987.

**P. ANGELOV**

---

Revuo „INTERNACIA KOMPUTADO", aperanta 4-foje jare en Hungario estas abonebla en Bulgario. Abonprezo: 8 levoj. Oni povus aboni ankaŭ por 1984. Peranto: Todor Dimitrov, str. „N. Pikolo" 11, BG-5000 Veliko Târnovo, Bulgario.

# E-KINOKLUBO „EVRIDIKA" AKTIVADAS

Per sia modesta agado la E-kinoklubo „Evridika"[1] en Smoljan celas konservi por la generacioj parteton de nia nacia heredaĵo, de la bulgara animeco, de la belaĵoj de Rodopimontaro kaj de la modernigita dum la jaroj de socialisma konstruado distrikto de Smoljan. Ĝia plej grava tasko estas prezenti per filmoj, diapozitivoj kaj fotoj laborĉiutagecon kaj festotagojn, arkitekturan kaj historian heredaĵon, folkloron, atingojn de la esperantistoj en la regiono de la Meza Rodopi-montaro.

En la kadro de la Bulgara Esperantista Kino-Foto-Sekcio la 13-an de oktobro 1978 en urbo Smoljan estis fondita la unua en nia lando loka amatora E-kino-foto-klubo „Evridika". Ĝiaj fondintoj estas: Stojan Stamenov Krâstev, Maria Vasileva Diĉeva, Jordan Miĥajlov Jordanov, d-ro Vasil Durev, inĝ. Atanas Vasilev Parov, Ĥristo Marinov Dacinski, R. Bukov k. a.

En daŭro de 4 jaroj la klubanoj faris 13 kolorajn kaj nigreblankajn mallongajn filmojn, multajn diapozitivojn kaj fotojn. Per la kreitaj filmoj kaj diapozitivoj la kino-klubo partoprenis en distriktaj, naciaj kaj internaciaj kinofestivaloj kaj revuoj. La filmo „Laŭ la vojo de amikeco" estis distingita en festivalo en Pollando, en 1980, kaj estis projekciata en la kongreso de UEA en Antverpeno, Belgio (1982), kaj en la revuoj de E-parolo kaj kanto en Loveĉ, Veliko Târnovo kaj Smoljan. La filmo „Strato" estas distingita dum la Distrikta Revuo de Amatoraj Filmoj en Smoljan. „Leteroj" kaj „La verdaj epoletoj" (kun sonigita teksto en Esperanto), okupis unuan kaj duan lokojn en la revuo de E-parolo kaj kanto en Pleven 1982 kaj en Smoljan 1983. La filmo pri la heroo de socialisma laboro Minĉo Papasĉikov estis difinita de la ĵurio en Burgas por elsendo per la televido, kaj „Subteraj suproj" (pri la vizito de la unua partia kaj ŝtata gvidanto de PR Bulgario Todor Ĵivkov en Smoljan kaj Madan) okupis unuan lokon en la revuo „Smoljan-83" kaj gajnis la rajton partopreni la kinorevuon de amatoraj filmoj en Sofio 1984. La ceteraj filmoj partoprenis la naciajn kinorevuojn en Burgas, Veliko Târnovo, Ŝumen, Trjavna, Plovdiv kaj Loveĉ kaj ricevis diversajn premiojn. La kinoamatoro Vasil Frenkev gajnis unuan premion pro siaj diapozitivoj en la revuo en Loveĉ. La kinoklubo organizis kinovesperojn en la klubo de Kulturagantoj en Smoljan. Krome, la filmoj estas projekciataj antaŭ lernantoj kaj studentoj, civitanoj, niaj kaj alilandaj gastoj de la klubo, en kunvenoj kaj festaj vesperoj en Smoljan, Zlatograd, Madan, Ĉepelare, Asenovgrad, Plovdiv, Smoljan, Mogilica k. a. La klubanoj eldonas murgazeton „Kinematografo", kiu respegulas la vivon kaj agadon de la kinoamatoroj en Smoljan.

Per sia agado la kinoamatoroj donas sian kontribuon por realigo de la taskoj, starigitaj de la XII kongreso de BKP kaj de la 40-a kongreso de BEA por la klasa-partia, patriota kaj internacia edukado en nia lando, strebas al estetiko kaj beleco en la homaj interrilatoj, batalas por konservo de la paco.

**MARIA DIĈEVA**

[1]**Evridika** (laŭ la Esperanta ortografio — Eŭridica) — edzino de la sorĉa muzikisto Orfeo — Noto de la Red.




**Murgazeto „Kinematografo" n-ro 2/1984, eldonata de Kino-Foto-Klubo „Evridika" en Smoljan.**

## BRONZA MEDALO POR E-KINOKLUBO „EVRIDIKA"

De la 29-a de majo ĝis la 3-a de junio 1984 en Sofio okazis VI Respublika Festivalo de Belarta Amatora Agado, dediĉita al la 40-a datreveno de la socialisma revolucio en Bulgario. Antaŭ vasta publiko kaj kompetenta ĵurio, gvidata de la popola artisto Zaĥari Jandov, estis prezentitaj 199 amatoraj filmoj de 40 plej bonaj kinokluboj el la tuta lando.

E-kinoklubo „Evridika" el Smoljan sin prezentis per la dokumenta filmo „Subteraj suproj" kaj gajnis bronzan medalon. Individue per bronzaj medaloj estis distingitaj la esperantistoj Maria Diĉeva — scenaristo, Stojan Krâstev — kameraisto kaj Atanas Parov — reĝisoro.

**M. VASILEVA**

## PLENKUNSIDO DE CE DE BEA

La 25-an de majo k. j. en Sofio okazis Plenkunsido de la Centra Estraro de BEA.

Ĥristo Gorov, prezidanto de CE de BEA, faris raporton „Altkvalita laboro unualoke!" La longdaŭra programo, kiun aprobis la Nacia Partia Konferenco pri la Kvalito, estos bazo de la entuta laboro estonte. CE de BEA starigos unualoke la problemon pri la kvalito — fundamenta premiso por intensa evoluo de la lando. BEA faros gravajn ŝanĝojn en sia agado, por ke Esperanto estu en servo de nia patrolando.

Dimitâr Papazov, sekretario de CE de BEA, prezentis projekton de la Nacia Kompleksa Programo „100 jarojn Esperanto", kiu celas prepari la celebradon de la centjariĝo de la Internacia Lingvo. Li tralegis instrukcion pri la konkurado inter E-societoj, distriktaj estraroj kaj sekcioj omaĝe al la 41-a Bulgara E-Kongreso en 1985.

La Plenkunsido akceptis la projektojn de la Programo „100 jarojn Esperanto" kaj Decido lige kun la Programo de la Nacia Partia Konferenco pri la Kvalito.

Okazis vigla diskutado. Estis eldiritaj utilaj proponoj kaj sugestoj pri la kvalito de la estonta agado.

Nikola Aleksiev, honora prezidanto de MEM, distingis Ivan Vasilev kaj Petko Arnaudov, ambaŭ el Pazarĝik, per honora diplomo kaj honora insigno de MEM okaze de ties 30-jariĝo.

E. G.

## EN SERVO DE LA PACO KAJ PROGRESO

Inter la 6-a kaj 11-a de junio k. j. en Sofio okazis la XVI Internacia Ekspozicio-Foiro de Libroj. Ĝi trapasos sub la tradicia devizo: „La libro en servo de la paco kaj progreso". Partoprenis rekorde multaj eldonejoj kaj librokomercaj firmaoj el tuta mondo.

Unuafoje BEA partoprenis la Internacian Ekspozicion-Foiron per stando de bulgaraj kaj eksterlandaj E-libroj. Multaj eksterlandaj E-eldonejoj kaj -asocioj disponigis siajn eldonaĵojn.

La deĵorantoj ĉe la stando respondis multajn demandojn pri la Internacia Lingvo, pri la E-eldonagado kaj informis la interesiĝantojn pri kursoj de Esperanto.

E. G.

# ATENTON! LA ABONKAMPANJO KOMENCIĜAS!

**LA ABONKAMPANJO 1985 JAM ESTAS SUR LA SOJLO!**
**NI PREPARU NIN POR ATINGI PLI BONAJN REZULTOJN!**
**ABONOJ AL „BULGARA ESPERANTISTO" VALIDAS POR LA TUTLANDA E-KONKURADO!**

En la komenco de septembro komenciĝos la abonkampanjo por la asocia organo „BULGARA ESPERANTISTO"! Pro tio ni urĝas averti ĉiujn niajn legantojn, kursgvidantojn kaj E-aktivulojn senprokraste komenci la preparlaboron por la abonkampanjo.

Kiel sciate, la plenkunsido de CE de BEA, okazinta la 26-an de majo j. k., proklamis tutlandan konkuradon inter la E-societoj kaj distriktaj estraroj de BEA, en kiu grava punkto estas ankaŭ la abonado al niaj E-revuoj — unualoke al „Bulgara Esperantisto".

Ni alvokas ĉiujn distriktajn kaj societajn estrarojn de BEA, ĉiujn E-aktivulojn, kursgvidantojn kaj eksterlandajn perantojn ĝustatempe komenci pli vastan propagandan laboron por abonado al nia belaspekta kaj enhavoriĉa revuo „BULGARA ESPERANTISTO".

Trovu ankaŭ perantojn-volontulojn, kiuj okupiĝu pri la abonado al „BULGARA ESPERANTISTO" kaj ne forgesu, ke ili rajtas 3%-an rabaton fare de REP (Ŝtata Entrepreno por Disvastigo de la Gazetaro).

La Centra Estraro de BEA kaj la redakcio ankaŭ ĉi-jare sendos kontrolajn ciferojn por abonado al „BULGARA ESPERANTISTO" — konkrete por ĉiu distrikto kaj E-societo, kies plenumo estos valida por via partopreno en la tutlanda E-konkurado.

AMIKOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO",
PREPARU VIN POR LA NOVA ABONKAMPANJO!
NE ATENDU LA LASTAN MOMENTON!
ĈIU MEMBRO DE BEA — ABONANTO DE „BULGARA ESPERANTISTO"!

LA REDAKCIO

## SOCIETO DE AKTOROJ-ESPERANTISTOJ

La 30-an de junio j.k. en la Junulara Teatro „Ljudmila Ĵivkova“ en Sofio okazis fonda kunveno de la Societo de Aktoroj-Esperantistoj en Bulgario. La membroj-fondintoj estas aktoroj el la Junulara Teatro. Espereble aliĝos ankaŭ aktoroj el aliaj ĉefurbaj teatroj.

La kunveno estis gvidata de Kunĉo Vâlev, direktoro de la Bulgara Esperanto-Teatro (BET), kiu konigis al la ĉeestantoj la plej gravajn punktojn el la statuto de BET.

Estis elektita estraro de la societo en konsisto: Nikolaj Uzunov — prezidanto, kaj membroj — Nikolaj Klisurov, Ĥrisula Garili kaj Ivanka Mileva.

La ĉeestantaj 20 geaktoroj metis siajn subskribojn kiel kunfondintoj de la nova societo. Inter ili estas la meritaj aktorinoj Conka Miteva, Nadja Topalova, Luna Davidova kaj Gertruda Lukanova (reĝisorino).

La aktoroj el la societo estas membroj de la Bulgara Esperanto-Teatro, kiu en majo k.j. bonege prezentis en Burgas kaj Sofio la spektaklon „La milionulo“ de Jordan Jovkov.

K. Vâlev informis la membrojn de la societo pri la respondecaj taskoj, starantaj antaŭ BET: partopreno en la festado de la 40-a jubileo de la socialisma revolucio en Bulgario, en la kultura programo de Balkanlanda Esperantista Renkontiĝo en oktobro j.k., en la kultura programo de la 41-a kongreso de BEA en julio 1985, en la UEA-kongreso en FRG en 1985, en la kulturaj aranĝoj lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto en 1987 ka.

D-ro CVETA STAMENOVA

## INTERESA KUNVENO

En Tolbuĥin okazis kunveno, dediĉita al humuro kaj satiro. Partoprenis 11 esperantistoj per humuraĵoj, prenitaj el „BE“, el aliaj E-revuoj, libroj aŭ tradukitaj el la bulgara lingvo.

Elena Popova disdonis al ĉiuj ĉeestantoj presitajn krucvortenigmojn, kompilitajn de ŝi. Ĉiuj provis diveni ilin.

La kunveno montriĝis utila formo por perfektigo de la lingvo kaj por la aktivado de la esperantistoj. Ĉiuj ĉeestantoj restis kontentaj.

SL. ŜIJAKOV

## ENHAVO


S. DÂLBOKOV. Nevelkanta gloro . . . . . . II
Ĥr. GOROV. Nia idealo realiĝis . . . . . .1, 2,
D. ĤITROV. En la nesto de rodopaj falkjo . . 3, 4, 5
*** Resumojde la raportoj . 5, 6, 7, 8, 9
*** Eĥoj . . . . . . . . . . . . . 9, 10
*** Celebro de la 75-jariĝo de N. Aleksiev 11
N.. Babaĉev. Rememoroj . . . . . . . . 12, 13
Prof. d-ro St. Ĝuĝev. Nova grava paŝo . . . . 13
P. Angelov. Ekologio kaj produktado . . . . 14
M. Diĉeva. E-kinoklubo „Evridika“ aktivadas . 15
*** Enlanda movado . . . . . . . . . 16
*** Tra la gazetaro . . . . . . . . . III
M. Ĉolev. La urbo de Vela . . . . . . . . . IV


## TRA LA GAZETARO

**En Sofio:**

En la monata profesia revuo **„Bibliotekar“** kajero 5 (majo 1984)aperis dup aĝascienca artikolo „Esperantaj bibliotekaj serioj en Bulgario“ de Olga Cankova el Veliko Târnovo.

La populara ilustrita revuo **„Oteĉestvo“** en sia 11-a kejero (12. V. 1984) aperigis artikolon titolitan „Li inspiris la popolan unuecon“, pri nelegala eldono (en 1936 en Japanio) de la raporto de Georgi Dimitrov pri Popola Fronto, tradukita el Esperanto. Aŭtorino de la artikolo estas Vasja Cvetkova, administra sekretario de MEM, kiu vizitis Japanion laŭ invito de JPEA.

**En la provinco:**

En ĵ. **„Partizanski Zov“** — u. Pomorie (15. 5. 1984) aperis informo pri la partopreno de lokaj esperantistaj gejunuloj en la tutlanda festivalo de la esperantaj kanto kaj parolo en u. Plovdiv.

Per informo de Maria Diĉeva ĵ. **„Rodopski Ustrem“** — u. Smoljan (14. 6. 1984) sciigas pri distingo per bronza medalo al la loka kino-amatora E-klubo „Evridika“ en nacia festivalo de la amatoraj kino-kluboj.

Ĵ. **„Botevgradski Plamâk“** — u. Botevgrad (23. 6. 1984) aperigis artikolon pri la vivo kaj agado de Filip Dilov Krâstev okaze de la 40-jara datreveno de lia pereo en la kontraŭfaŝisma batalo. Oni mencias, ke li estis esperantisto.

Sur la unua kovrilpaĝo: monumento de Vela Peeva en Velingrad. Foto: Kiril Kalĉev


Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV
Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI
Respondeca sekretario: Lidia RAEVA
Redakta komitato: Marin BAĈEV, Vasil BOROVANSKI, Radoslav DOJĈINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimitâr ĤAĜIEV, Krâstju KARUCIN
Administranto — ASEN JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodio“ — I grado.
Eldonkvanto 6500 ekz.
Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97
1303 Sofio, Bulgario P. K. 66
tel. 31-70-19 1 000 Sofio
Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

ISSN—02—8701

# ĈARMA LANDO

## LA URBO DE VELA

En la okcidenta parto de la fabele bela valo de Ĉepino brilas unu perlo — Velingrad.

La regiono de Velingrad okupas la plej okcidentan parton de Rodopi-montaro. La urbo situas je 770 m super la marnivelo.

Velingrad estas juna urbo. Sur la mapo de Bulgario ĝi aperis en la komenco de 1948. Ĝi formiĝis el la kuniĝo de tri bankuracaj loĝlokoj — Ĉepino, Lâĝene kaj Kamenica.

La urbo pitoreske situas sur la maldekstra bordo de rivero Ĉepinska. Kiel tuto ĝi sin apogas al la monto kaj kelkloke eĉ eniras ĝin. La korifera oceano, kies insulo estas la urbo, sin etendas je centoj da kilometroj.


Velingrad estas granda turista centro. Ĝi estas elirpunkto ne nur al la rodopaj montosuproj Ostrec kaj Ĉernovec (Arap-ĉal), Elin, Milevi Skali kaj Sjutka (2186 m super la marnivelo), sed ankaŭ al Rila- kaj Pirin-montoj. Dekoj da belegaj kaj allogaj lokoj situas ĉirkaŭe: Kleptuza, Jundola, Kladova, Breza, Sofan-dere. .:. Kaj certe estus preterlaso ne mencii la akvobaraĵojn ĉe Batak, Dospat kaj Belmeken — ili estas la bluaj okuloj de la monto, speguloj de la altaj montosuproj, allogaj punktoj por miloj da ŝatantoj de la naturbelaĵoj.

Velingrad estas fama kuracloko ne nur en Bulgario, sed ankaŭ en tuta Eŭropo. Jare tie ĉi ripozas pli ol 300 000 bulgaroj kaj alilandanoj. La banloko disponas pri modernaj sanatorioj, bankuracejoj, ripozdomoj, hoteloj.

Velingrad havas mildan klimaton, kun influo de Mediteraneo. La meza vintra temperaturo estas inter $+3,5$—$5^\circ$ laŭ Celzio, la somera — ĉirkaŭ $+18^\circ$. Abundas la suntagoj, nur ĉirkaŭ 20 tagoj en la jaro estas nebulaj. La pluvoj estas malpli ol la mezaj por la lando — 550 mm. En la urbo la neĝo restas ne pli ol 50 tagojn. Kaj el la tersino ŝprucas ĉirkaŭ 70 mineralakvaj fontoj, donas 180 litrojn da kuracakvo posekunde. La kuracakvoj estas diversaj kiel laŭ la temperaturo (de $40^\circ$ ĝis $80^\circ$), tiel ankaŭ laŭ la minerala konsisto. Ili estas klaraj, senkoloraj, senodoraj, krom tiuj en Kamenica kaj Draginovo, kiuj odoras je sulfuro. La varmaj akvoj de Velingrad stimulas la koron, la sango-cirkulan, la nervan, endokrinan, digestan k.a. sistemojn de la homa korpo. Ili bone efikas ankaŭ sur la ost-muskolan kaj artikan sistemojn.

Kaj postsignoj pri homoj vivantaj en la regiono de Velingrad venas el la 5-a jarmilo a. n. e. La plej malnova gento loĝinta tie ĉi estas la tracoj Besi. Dum la unua jarcento de nia erao venas la romianoj, poste — la grekoj kaj dum la 6-a jarcento — la slavoj. Iom post la slavoj venas tien ĉi la prabulgaroj, kiuj trovas en la regiono la slavan genton Dragoviĉi. Plej gravaj historiaj monumentoj estas la baziliko en vilaĝo Kostandovo, la mezepoka citadelo Cepina kaj en pli nova tempo — la terdometoj de la partizanoj de la taĉmentoj „Bratja Krâstini" kaj „Ĉepinec". De ĉiuj historiaj epokoj oni trovis postsignojn, kiuj estas eksponitaj en la urba muzeo „Vela Peeva" en Velingrad kaj en la distrikta historia muzeo en urbo Pazarĝik.

Aparte oni devas mencii la finon de la dua bulgara regno, kiam la bulgaroj de tiu ĉi regiono heroe batalis kontraŭ la Bizanca Imperio. Ĝuste tiam oni konstruis sistemon da citadeloj, inter kiuj la plej granda estas Cepina, ĉefurbo de despoto Slav. Per rektaj atakoj la turkoj ne sukcesis ĝin konkeri, pro kio la lokaj bulgaroj ricevis la rajton vivi libere, kiel en soldata loĝloko. Tie ĉi konserviĝis la nacia konscienco kaj la batalema bulgara spirito, kiuj sin manifestis ankaŭ en plej nova tempo



Vidaĵo de Velingrad

dum la batalo kontraŭ monarko-faŝismo. El Velingrad iris en la montaron ĉirkaŭ 200 gepartizanoj, kiuj havis pli ol 1 000 helpantojn. En la batalo kontraŭ faŝismo pereis 55 batalantoj, kies nomoj por ĉiam restos en la gloraj paĝoj de nia plej nova historio. Inter ili estas la popola heroino Vela Peeva (kies nomon portas la urbo) kaj la herooj Stoju Kalpazanov kaj Angel Ĉopev — fervoraj esperantistoj, kies vivo kaj heroaĵo ĉiam inspiros la junularon por aktiva kontribuo al la konstruado de nova, pli feliĉa vivo.

MANOL ĈOLEV



BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL